

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361

2

1993

中國新道

EL POPOLA

ĈINIO





Neça arbaro

Foto de LIU SIGONG





Sciuro

Foto de LIU SIGONG

INTER NI

Rimarkigoj de niaj legantoj

Mi ne konsentas kun "kokovo". Koko ja estas virseksa, tial estas malguste diri "kokovo", ofte uzita

en pasintaj tekstoj.

GEORGO OTTO VASKE
(Brazilo)

"Kokovo" estas kutima esprimo. Oni povas diri ankaŭ "kokina ovo".

La Red.

Mi rimarkis, ke la tuta amplekso

de la bildoj, kiuj estas 40-50% de EPC, estas troa. Sufiĉas 30%.

SZENTGYÖRGYI ZOLTÁN
(Hungario)

Nia revuo havas 56 paĝojn ĉiunumere, inter kiuj 20 estas koloraj kaj 36 nigra-blankaj kun ilustraĵoj. La bildoj koloraj kaj nigra-blankaj okupas ĉirkaŭ duonon de la revuo. Ĝusta estas la opinio de s-ro Zoltán. Tian opinionon prezentis al ni ankaŭ aliaj legantoj. Estonte, ni reduktos la nombron de bildoj sub la premiso garantii la abundecon de bildoj kaj tekstoj.

La Red.

Laŭ mi la rubriko pri krucvorto prenas tro da loko, kaj eĉ ne taŭgas en tiu revuo. EPC devas trakti nur pri Ĉinio. Antaŭe ŝajnis al mi, ke vi plidiversigis la kovrilojn, nun vi montras nur personojn, ĉu ĉar vi estas tre multnombraj?!

CLARY FRANCOISE
(Francio)

Jam minimume 3-foje mi petis publikigi mapon de Ĉinio, ke oni povu trovi ĉiujn provincojn, naciajn distriktojn kaj kompari, kie estas diferenco inter ili en kulturo, vivmaniero ktp.

JAZEPS ŠLARS
(Latvio)

Ni akceptis la proponon de s-ano J. Šlars kaj faris simplan mapon de la administraj distriktoj de Ĉinio por donaci ĝin al niaj legantoj kiel kromfolion de tiu ĉi numero.

La Red.

La unua publikigo de mia anonceto en la 5-a numero havigis al mi 39 fremdlandajn letergeamikojn. Tio estas bonega kaj mi tre kontentas pro la atento, kiun la legantoj de EPC donas al nia kara revuo. Kial EPC denove aperigis mian adreson en la 9-a numero? Tio havigis al mi 6 novajn letergeamikojn. Kia mirindaĵo! Sed kiu pagu la duan anonceton?

ALICE AMALIA KLEIN
(Brazilo)

Pro neglekto ni republikigis la anonceton de s-anino Alice Amalia Klein. Ŝi ne pagu por la dua anonceto. Ni deziras, ke niaj legantoj amikiĝu pere de la anoncetoj.

La Red.


ENHAVO

- 8 Pekino sur la vojo al la 27-aj Olimpiaj Ludoj
- 22 La Silka Vojo hodiaŭ
- 12 **Taihu-lago post la inundo**
- 6 **Tie leviĝis satelitoj**
- 34 **HISTORIA MISTERO**
Pri la maŭzoleo de Qin-dinastio kaj argilaj militistoj kaj ĉevaloj
- 14 **Luktado de handikapuloj**
- 39 Nova tumor-lokalizilo
- 20 Surplacaj artoj en Tianjin
- 42 En Bazaro de Malnovaj Popolaj Artaĵoj de Pekino
- 27 **ARTOJ DE ĈINIO**
Hao Liangbin kaj peonioj
- 37 Indiĝenoj kaj iliaj infanoj (Novelo)
- 50 **EL ĈINAJ GAZETOJ**
- 26 Salikoko-kulturado sur marbordo
- 30 Ĉina ĝardenistiko en la mondo
- 45 **MOROJ DE ĈINAJ NACIOJ**
Geedziĝa moro de tuĝja-oj

- 51 **LAŬ ANTIKVA VOJO AL TIBETO (XV)**
Sur Bayanhar-montaro
- 41 **ITINERO PROPONITA**
Vojaĝo al la Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero
- 44 **AMUZOJ**
- 48 **KURANTAJ AFEROJ**
- 18 Vojaĝo en sep eŭropaj landoj
- 17 Geesperantistoj intervizitadu
- 43 **SUR NIA LIBROBRETO**
Pri la ekstera politiko de Finnlando en la pasinteco
- 19 **POR KOMENCANTOJ**
La edzino de la Luno
- 4 **INTER NI**
- 16 **ESP-NOVAĴOJ**
- SUR LA KOVRILO:**
Kampara infano Foto de **LIU SIGONG**
- 2 Neĝa arbaro
- 4 Sciuro
- 32 Tianjin vidata de sur la televizia turo
- 36 Brikskulptaĵoj en Ĉinio
- SUR LA DORSKOVRILO:**
Popolaj ludiloj

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Lanzhou (p. 22)
2. Taihu-lago (p. 12)
3. Jinxian-gubernio (p. 26)
4. Xichang (p. 6)
5. Lintong-gubernio (p. 34)
6. Chongqing (p. 41)
7. Yangzhou (p.30)



TIE LEVIĜIS SATELITOJ

de KE BIAN

XICHANG (Ŝjiĉang) estis izolita loko dum longa tempo. Sed la 8-an de aprilo 1984 tie leviĝis la unua ĉina telekomunika satelito kaj la loko vekis publikan intereson. En 1988 la ĉina registaro malkovris al la mondo la sekreton de la satelita lanĉejo en Xichang, kaj de tiam la loko estas malfermita al la mondo.

PLEJ BONA FENESTRO AL LA SPACO

La unua satelita lanĉejo de Ĉinio estis en Jiuquan (Ĝiŭĉjŭan) meze de Gobio en nordokcidenta Ĉinio. La loko situas pli ol 40 gradojn sur la norda latitudo, kio ne bone helpas lanĉi sinkronan telekomunikan sateliton sur la orbito 36 000 km. super la tero. Por havi pli taŭgan lanĉejon de telekomunika satelito, ĉinaj fakuloj esploris 81 guberniojn de 9 provincoj en la sudokcidenta, nordokcidenta kaj centra partoj de Ĉinio kaj fine elektis la valon Shaba en nordokcidenta Xichang.

Xichang situas en la sudokcidenta parto de Ĉinio, kie kuntuŝiĝas la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo kaj la baseno Sichuan kaj ondas montoj. La meznombra altitudo estas 1 500 metroj, la aero estas purega, kaj unu jaro havas 320 lumtagojn. Tie regas subtropika altebenaĵa musona klimato, la jara meznombra temperaturo estas 17°C kaj la ŝanĝiĝo de temperaturo en la jaro estas la plej malgranda en la lando.

Krome, la loko sidas 28 gradojn sur la norda latitudo, kaj la raketo lanĉita tie povas maksimume utiligi la centrifugan forton de la tergloba rotacio, ke ŝpariĝas fuelo, pligrandiĝas ĝia pezo de valida ŝarĝo kaj la satelito povas pli rapide eniri en la sinkronan orbiton.

Junie de 1970, ĉefministro Zhou Enlai (Ĝoŭ En-laj) diskutis kun diversfakaj specialistoj kaj decidis, ke Xichang estu alia fenestro de Ĉinio por iri al la spaco.

MISTERA MONDO EN VALO

Impone fruktis dekjara penado: nova urbo aperis en la valo Shaba.

La okulojn frapas la placo de la lanĉejo meze sur montodeklivo. Sur la placo estas 2 startlokoj. Sur la 1-a startloko staras 77-metra skafaldo, kie estas 11-etaĝaj platformoj, turneblaj je 180 gradoj. La hermetika sistemo por purigi aeron kaj reguligi temperaturon kaj humidecon povas teni la sateliton en bona medio de mezurado kaj konservado antaŭ la lanĉo. 3 fulmoforigilaj skafaldoj ĉirkaŭas la lanĉan skafaldon. Proksime de ĝi estas la 2-a startloko konstruita en 1990. Ĝi estas uzata por lanĉi grandpovan transportan raketon, kiu povas porti 4.5-tunan sateliton en la sinkronan orbiton.

Sub la lanĉa skafaldo estas kanaletoj, kiu povas forkonduki la fajron ellasitan de la bruligita raketo sur montodeklivon en distanco de almenaŭ 100 metroj.

Proksime de la lanĉejo estas subtera regadejo, kiu plenumas la ordonojn por lanĉo de satelito.

10 kilometrojn for de la lanĉejo estas la centra komandejo, kie oni donas ordonon, traktas datenojn, sendas informojn, sinkronigas horojn kaj kontrolas sekurecon. Meze de la halo staras giganta televida ekrano kaj panelo kun diverskoloraj signalumoj. Kiam satelito estas lanĉata, tie sidas la plej supera komandanto kaj diversfakaj specialistoj por informi pri la lanĉado.

Tie estas ankaŭ domo por munti, mezuri kaj purigi sateliton kaj satelita surtera telekomunika stacio.

LANĈADO DE LA SATELITO "AZIO 1"

La 8-an de aprilo 1984 la raketo Changzheng 3 portis la unuan ĉinan telekomunikan sateliton en la orbiton, je fiksa punkto. Poste, tie leviĝis aliaj 6 telekomunikaj satelitoj kaj la unua ĉina kunligita

raketo kun granda movforto.

1986 estis katastrofa jaro en la kosmonaŭtika historio de la mondo. La 28-an de januaro la usona kosmoŝipo Defianto eksplodis 72 sekundojn post la ekbruligo kaj pereis la tuta personaro en la ŝipo. La 18-an de aprilo malsukcesis la lanĉo de detektiva satelito. Unu monaton post tio, malsukcesis la lanĉo de la raketo Ariana de la Eŭropa Kosmonaŭtika Buroo pro nebruliĝo de la 3-a ŝtupo. La akcidentoj kreis longan vicon da klientoj, kiuj atendis lanĉi siajn satelitojn. Ĉinio kaptis la ŝancon por enviciĝi inter la konkursantoj sur la internacia kosmonaŭtika merkato.

La telekomunika satelito "Azio 1" estis farita de la usona Hughes-kompanio kaj aĉetita de la Azia Satelita Kompanio. La Ĉina Industria Kompanio "Granda Muro" prenis sur sin la taskon lanĉi la sateliton.


La 7-an de aprilo 1990, la raketo Changzheng 3 portis la sateliton en la orbiton. Tio estis la unua fojo, ke ĉinoj lanĉis sur la ĉina teritorio sateliton faritan de Usono per ĉina raketo. Kaj per tio oni enskribis novan paĝon en la historion de la ĉina kosmonaŭtiko. Pli ol 200 honoraj gastoj el 17 landoj kaj regionoj ĉeloke spektis la tutan lanĉadon de la satelito, kaj la Ĉina Centra Televido faris la sinkronan transsendon pri la lanĉo.

TIE LEVIĜIS AŬSTRALIAJ SATELITOJ

Novembre de 1988 Ĉinio kaj Usono subskribis la kontrakton pri ĉina lanĉo de aŭstraliaj satelitoj. En la kontrakto estas difinite, ke Ĉinio lanĉos per la kunligita raketo Changzheng 2 la telekomunikajn satelitojn Aussat B-1 kaj Aussat B-2 faritajn de la usona Hughes-kompanio por Aŭstralio. La totala pezo de la 2 plej freŝdataj triaksaj telekomunikaj satelitoj kun stabila granda kapacito kaj la 2 ŝtupoj de la raketo estis 7 659 kg. La satelitoj anstataŭos la unuageneraciajn telekomunikajn satelitojn de Aŭstralio, kiuj ĉesos funkcii en decembro 1992. Se Ĉinio ne povos plenumi la promesitan laboron, Usono pagigos ĝin je la kompenso de miliono da usonaj dolaroj.

Ĉinoj pene laboris 18 monatojn por la preparado, kiu kutime bezonas 4-5 jarojn. Ili elfaris la unuan ĉinan kunligitan raketon kun granda movforto — Changzheng 2, kiu konsistis el 2 ŝtupoj likva fuelo kaj 4 alligitaj helpleviloj. La kvalito ĉe la ekflugo pezis 460 tunojn kaj la movforto estis 600 tunoj, sufiĉaj por lanĉi la satelitojn.

Vespere de la 22-a de marto 1992, multe da ĉinoj restis hejme por televidi la lanĉon. Sed ĝi malsukcesis. 40 minutojn post la 18-a, la ordono de ekbruligo estis farita, sed 2 helpleviloj ne estis bruligitaj. 4.5 sekundojn antaŭ la difinita horo la motoro de la raketo urĝe ŝaltiĝis per si mem, kaj tion sekvis homa



Aranĝo de satelito

urĝa ŝalto. La motoro ŝprucigis fajron en temperaturo de 2 000°C, kaj la tuta lanĉejo estis englutita de bruneta flamo.

En la scienca eksperimento sukceso kaj malsukceso estas ĝemeloj. La lanĉo malsukcesis, sed oni rimarkis en tio la originalan superecon de la sekuriga sistemo de raketolanĉo, nome, la ekbruligita raketo povis mem ŝaltiĝi por ĉesigi la lanĉon, kaj tiel evitiĝis la pereado de la raketo.

Ĉinaj kosmonaŭtikaj specialistoj serioze ekzamenis, analizis kaj esploris la malsukcesan lanĉon, pene laboris 100 tagojn kaj elfaris la novan raketon Changzheng 2.

La 7-an matene de la 14-a de aŭgusto 1992, la nova raketo sukcesis porti la aŭstralian sateliton en ĝian orbiton.

Kompare kun aliaj landoj, la tasko, kiun Ĉinio plenumas por lanĉi alilandajn satelitojn, konsistigas nur malgrandan parton de la laboro sur la internacia satelita merkato, sed la kapablo de Ĉinio tiurilate estas bone taksata de la internaciaj kosmonaŭtikaj rondoj. La laborantoj de la satelita urbo Xichang firme kredas, ke pli kaj pli multaj satelitoj leviĝos tie en la estonteco. ■

Pekino sur la vojo al la 27-aj Olimpiaj Ludoj

Teksto de DA WEI

Fotoj de YE YONGCAI kaj CHENG YUYA

LA 23-an de septembro 1993, la Internacia Olimpika Komitato okazigos sian 101-an kunvenon en Montekarlo de Monako. En ĝi oni voĉdonos por la elektiteco de la ok urboj proponintaj gastigi la Olimpiajn Ludojn en 2000 per sepfoja sekreta balotado kaj la prezidanto de la komitato publikigos la rezulton de la voĉdono.

Pekino estas unu el la ok urboj.

SUPERECOJ KAJ MALSUPERECOJ DE PEKINO

Famaj ĵurnaloj de Usono kaj Germanio faris komparon inter Pekino kaj la aliaj sep urboj kaj montris, ke la plej granda supereco de Ĉinio estas ĝiaj pli ol 1.1 miliardoj da loĝantoj, ĉar la celo de la Olimpiaj Ludoj estas partoprenado; Pekino, kiel antikva kaj moderna urbo, allogas turistojn per siaj brila kulturo kaj historiaj vidindaĵoj; kaj ĝi sukcese okazigis la 11-an Azian Sportkunvenon. La malsuperecoj de Pekino estas atmosfera polucio kaj neavangardaj trafikaj instalaĵoj.

La supre menciitaj malsuperecoj ĉiam ĝenas la vivon de la pekinoj kaj vekis grandan atenton de la magistrato.

En Pekino estas 500 000 aŭtoj. De la 70-aj jaroj la magistrato konstruigis multajn ŝoseojn en la urbo. Por mildigi la trafikajn streĉecon koncerna departemento faris serion da limigoj, ekz., iuj ŝarĝaŭtoj iras nur en paraj tagoj, kaj aliaj nur en neparaj; malkreskas la nombro de motorcikloj, ktp.

Tamen, ankoraŭ okazas blokado ĉe pli ol 200 vojkruciĝoj en la kulmina horo de la trafiko.

Sukcese okaziginte la Azian Sportkunvenon en 1990, Pekino oficiale prezentis sian peticion por gastigi la 27-ajn Olimpiajn Ludojn, kio estis aprobita de s-ro Li Peng, la ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio, nome de la ĉina registaro. Konsiderante la trafikajn kaj medion en Pekino, la magistrato decidis plenergie sol-

vi la malfacilaĵojn kaj krei favorajn kondiĉojn por okazigi la Olimpiajn Ludojn. Tial, jam komenciĝis rekonstruado de la dua rondŝoseo, ĉefa ŝoseo de Pekino, instalado de longdistancaj gasoliverantaj tuboj kaj konstruado de moderna aŭtovojo al la Pekina Aerodromo.


DUONHORO POR ĈIRKAŬIRI LA URBON

En la moderna konstruado, kiel la ĉefurbo de Ĉinio, Peki-

no neniam ĉesigis la konstruadon de ŝoseoj. En la 60-70-aj jaroj oni konstruis la duan rondŝoseon kaj la subteran fervojon sub ĝi. Kvankam ili faciligis la trafikon en la norda parto de Pekino, tamen estis ankoraŭ mallarĝaj la ŝoseoj en ĝiaj centra kaj suda partoj. Fakte, la ŝoseo ne estis perfekta, ĉar ĉe ĝia nordokcidenta parto estis sep vojkruciĝoj, kie la trafiko estis regata per semaforoj.

En decembro 1991 komenciĝis

Varmo-liveraj tuboj instalataj en la antaŭurbo de Pekino





Konstruado de ponto super la ekspresa aŭtovojo al la Pekina Aerodromo

la plena rekonstruado de la dua rondŝoseo. Ĉ. 10 000 konstruantoj tage kaj nokte pene laboris kaj plenumis la taskon fine de septembro 1992. Jen aperis la dua rondŝoseo, kun longo de 32 kilometroj sen semaforoj. En 11 monatoj ili finplenumis la konstruadon de la suda ĉefa parto de la ŝoseo, kun longo de 5.2 kilometroj, starigis dek aŭtovojjajn trefokruĉigojn kaj sep superŝoseajn pontojn por pasantoj. De la 70-aj jaroj Pekino konstruigis 70 aŭtovojjajn trefokruĉigojn.

La dua rondŝoseo servas kiel granda trafika arterio de Pekino. Laŭ tiu ĉi ŝoseo nur duonhoru jam sufiĉas por ĉirkaŭveturi la urbon. Koncernaj fakuloj diris, ke ĉiutage la flukvanto de aŭtoj sur tiu ĉi rondŝoseo estas pli granda ol antaŭe almenaŭ je 80 000. Ĝi ege mildigis la trafikan streĉecon en la centra parto de la urbo kaj faciligas multajn pasaĝerojn.

POR PURIGI AERON

En Pekino estas pli ol dek milionoj da loĝantoj. Granda kvanto da fumo kaj polvo, eligita el ilia vintra hejtado, estas fonto de polucio malfacile forigebla. Por bridi kaj malgravigi la atmosferan polucion, respondeculoj de la magistrato de Pekino konsideris kiel enkonduki en la urbon la ses mil-

ionojn da grandaj kalorioj da varmo, vane ellasitajn ĉiujare de termoelektrajo en la okcidenta antaŭurbo de Pekino. En septembro 1991 komenciĝis la konstruado de la grava projekto kun investo de 1.2 miliardoj da juanoj (5.5 juanoj egalas al 1 usona dolaro) pruntedonitaj de la Monda Banko. Tiu konstruajo trapasos pli ol 300 grandajn kaj malgrandajn vojkruciĝojn, fervojojn kaj kanalojn. Sub ĝi la geologia strukturo estas kompleksa, subteraj tuboj interkruciĝas, kaj plie, la surtera trafiko ne devas esti ĉesigita, tial tre malfacila estas la konstruado. Tamen, laŭ kontrakto pli ol 6 000 konstruantoj tage kaj nokte laboras sur la konstruejo. Venkinte ĉiajn malfacilaĵojn, ili provizis la lokon per subtera varmo-liveranta ĉeflinio longa je 18.5 kilometroj de la termoelektrajo ĝis la urbo, kaj subtera tubaro longa je tri kilometroj en la urbo.

Tiu konstruajo finiĝos en 1996. Ĝi liveros varmon por 15 milionoj da kvadrataj metroj kaj ĉiujare malmultigos 24 000 tunojn da sulfura dioksido, kio multe purigos la medion de Pekino. Krome, la magistrato de Pekino ankaŭ alprenis aliajn rimedojn, ekz., multigi civilajn gasinstalaĵojn, transloki fabrikojn grave poluantajn la medion, planti arbojn, vastigi

publikan verdejon, bridi la polucion de aŭtoj kaj konstrui fabrikojn por trakti eluzitan akvon.

LA UNUA ŜOSEO AL LA PEKINA AERODROMO


Oni nomas la 20-kilometran ŝoseon de Pekino ĝis la Pekina Aerodromo la Unua Ŝoseo de Nacia Pordo, kio akcentas la gravecon de tiu ĉi ŝoseo. Tamen, pro la plioftigo de la kontaktoj inter Ĉinio kaj aliaj landoj, la malnova ŝoseo jam ne adaptiĝas al la nova situacio, kvankam ĝi estis multfoje riparita.

En aprilo 1992, ĉe la malnova ŝoseo komenciĝis la konstruado de moderna aŭtovojo, longa je 18.1 kilometroj kaj larĝa je 34.5 metroj, kun 8 aŭtovojjaj trefokruĉigoj. Ĝi estas projektita tute laŭ internacia normo kaj finkonstruiĝos en la fino de septembro 1993.


Multaj kortuŝaj scenoj vidiĝis sur la konstruejo. En somero la ŝoforoj laboris kun nuda torso por transporti konstru-materialojn, ne timante la varmon de 50°C en la kamionoj. Ĉiutage ili 20-foje veturis 360 kilometrojn sur malebena vojo. Post laborado de dekkelkaj horoj iuj tre laciĝis kaj eĉ endormiĝis ĉe manĝado.

Por gastigi la Olimpiajn Ludojn la pekinanoj ne domagas sian forton eble pro tio, ke la spirito de la Olimpiaj Ludoj enradikiĝis en la koro. Vicurbestro s-ro Zhang Baifa diris, ke por okazigi la Olimpiajn Ludojn en Pekino, multaj aferoj, farotaj en la venonta jarcento, estas farataj en tiu ĉi jarcento, ekz., konstrui grandan modernan stacidomon, aerodromon kaj eventuale subteran fervojon.

Ĉu sukcesos ĉio ĉi? S-ro Chen Xitong (Ĉen Ŝjitong), la urbestro de Pekino kaj prezidanto de la Propona Komitato por Gastigi la Olimpiajn Ludojn en Pekino, asertis, ke estas grandaj la volo kaj espero de Pekino por sukcesigi la proponon, kaj grava ankaŭ la malfacileco por tio. ■



La ĉiŝovoja trefokruĉiĝo Caihuying sur la dua rondŝoseo



Taihu-lago post la inundo

TAIHU-lago famas pro sia beleco kaj riĉeco. En 1991 ĝi katastrofe inundis kaj pri tio zorgis ĉinoj kaj alilandanoj. Hodiaŭ ĝi denove vekas atenton per akvomastroma konstruado.

MANKO DE TAIHU-LAGO

La aŭtuna Taihu-lago kviete dronis en dolĉa sonĝo. Estis malfacile imageble, ke antaŭ 2 jaroj ĝi senbride superbordiĝis.


40 km norde de Taihu-lago preterfluas Yangzi-rivero, kaj la lago mem situas sur la limo inter Jiangsu- kaj Zhejiang-provincoj. La lago kovras 2 338 kvadratajn kilometrojn kaj ĉirkaŭe estas grandaj kaj mezgrandaj urboj Ŝanhajo, Hangzhou, Wuxi (Uŝji) kaj Suzhou.

La baseno de Taihu-lago, antaŭe parto de malprofunda maro, formiĝis el aluvioj de riveroj Yangzi, Qiantang (Ĉjantang) kaj aliaj grandaj kaj malgrandaj riveroj. Taihu-lago similas al granda telero, kies rando estas altaĵo super la marnivelo je 4-5 m, kaj la akvosurfaco en la lago estas pli alta ol la marnivelo je 2 m. Kiam la pluvokvanto estis ordinara, Taihu-lago kaj la ĉirkaŭaj malpli grandaj lagoj funkciis kiel naturaj akvokonservejoj. Sed kiam grandkvante pluvis, la superakvego malfacile fluis el ili. Precipe de majo ĝis oktobro, senĉesa pluveto, tajfuno kaj pluvego plenigis tiun "grandan teleron" per akvo, kiu malfacile elverŝiĝis. En 1991, la senĉesa pluvo komenciĝis ne nur frue, sed ankaŭ grandkvante. La akvonivelo de Taihu-lago superis la alarman nivelon de 3.50 metroj kaj atingis 4.79 m, rompinte la plej altan akvonivelon (en 1954) je 0.14 m. Pro tio multaj rizkampoj, moruskampoj, bambuogardenoj, fiŝbasenoj kaj fabrikoj sur la vasta ebenaĵo estis englutitaj de superakvego, kaj la perdo superis 10.3 miliardojn da juanoj.

40-JARA ORDIGADO DE TAIHU-LAGO

Kie estas elirejo de la superakvego de Taihu-lago? Okcidente de la lago baras montĉeno, sude de ĝi, ondas Hangzhou-golfo kaj Qiantang-rivero, kies tajdoj estas fame konataj; norde kaj oriente de la lago fluas Yangzi-rivero kaj ĝia elfluejo. Se la riverakvo subite altiĝas aŭ la astronomiaj altaj tajdoj returniĝas, estas malfacile forkonduki superakvegon el la lago.

Ĉu ne ekzistas elirejo de superakvego de Taihu-lago? Kompreneble jes. Ĉefingeniero Huang Xuanwei (Huang Ŝjŭanŭej), kiu speciale studis pri la ordigado de Taihu-lago, informis, ke post la inundo de Taihu-lago en 1954, oni faris iajn konstruaĵojn por akvokonservo kaj akvodreno en la baseno de la lago. Ekz., en Tianmu-montaro okcidente de la lago oni konstruis 130 000 grandajn kaj malgrandajn akvokonservejojn, akvobaraĵojn kaj basenojn, sur la ebenaĵo, plifortikigis kaj konstruis riverajn kaj marajn digojn kaj baraĵojn en totala longo de pli ol 540 km., plialtigis la digon ĉirkaŭantan Taihu-lagon, fosis kaj dragis riverujojn, konvene kunigis malgrandajn ĉirkaŭitajn kampopecojn en kavaj kampoj en 7 000 pli grandajn; laŭ la bordoj de Yangzi-rivero, oni konstruis pli ol 50 pumpokluzojn kaj pumpostaciojn. Dum la konstruado oni fosis entute 5 000 milionojn da kubmetroj da tero. Tiuj konstruaĵoj ludis gravan rolon en prevento de inundo, dreno de superakvo, navigacio k.a. Indas menciigi, ke dum la superakvego en 1991, la kontraŭinunda ĉefkomando de la ŝtato ordonis malfermi la orientan elfluejon de Taihu-lago en Jiangsu-provinco kaj sinsekve rompis plurajn baraĵojn inter Taihu-lago kaj Huangpu-rivero por malaltigi la akvonivelon de Taihu-lago, sekurigi Ŝanhajon, Wuxi, Ŝanhaja-Nankinan kaj Ŝanhaja-Hangzhou-an fervojojn. Iu hidraŭlika fakulo diris, ke se oni ne aplikus la



La akvomastroma konstruo ĉe Wuxi

menciitajn urĝajn rimedojn, la akvonivelo de Taihu-lago povus atingi 5.06 m (la plej malalta loko de la ĉirkaŭlaga digo altas nur je 5 m), kaj la terura rezulto estus malfacile imagebla.

REDRAGO DE LA "KORIDORO DE AKVODRENO"

La inundo en 1991 malkaŝis mankojn de Taihu-lago. Ekz., mankas pli grandaj konstruaĵoj por bari kaj defluigi superakvegion. En iuj lokoj, oni blinde polderigis ĉirkaŭ la lago, ŝtopante ĝiajn elfluojn, tio malgrandigis la kapaciton de Taihu-lago. Rezulte de tio areo de 500 kvadrataj kilometroj de Taihu-lago estis turnita en kampojn. Troa eltiro de subtera akvo malaltigis la teron de la grandaj kaj mezgrandaj urboj en la baseno de Taihu-lago. Rivervojoj ŝtopiĝis de ŝlimo kaj la akvo malglate fluas... Oni alfrontas urĝan ordigon de Taihu-lago.

Antaŭ la inundo, la Taihu-a Buroo sub la Ministerio de Akvomastromado elmetis "Planon pri la Sintezo Ordigo de Taihu-lago". Post la superakvego de 1991, la registaro okazigis kunvenon pri la ordigo de Taihu-lago kaj Huaihe-rivero, difinis la celon kaj taskon de la ordigo. Laŭ la plano, oni devas fari en 5 jaroj redragon de la riveroj Taipu, Wangyu, Nantai kaj la konstruon de la ĉirkaŭlaga digo, intensigante la konstruon de riveroretoj, urboj, urbetoj kaj la ĉirkaŭitaj zonoj sur la ebenaĵo, por formi la konstruan sistemon posedantan sintezan utiligan kapablon, kun Taihu-lago kiel la centro.

Sur la digo de Qiantang-rivero, pri kiu cirkulis de longe la diro "Kiu detruas unu herbon sur la digo, tiu enkarceriĝas dum la tuta vivo", mi informiĝis, ke jam finiĝis la konstruado de Changshan-rivero kaj la Changshan-a Kluzo. Ili ludis gravan rolon en la venko super la superakvego en 1992. Post la redrago de la 4 ĉefaj riveroj en la regiono

Hangzhou-Jiaxing-Huzhou, tiea superakvego defluos tra ili en Hangzhou-golfon kaj la regiono kun areo de 2 300 kvadrataj kilometroj estos sekurigita kontraŭ inundo. Sur la konstruejo de Taipu-rivero interliganta Taihu-lagon kaj Huangpu-riveron, grandaj kaj malgrandaj veturiloj navetis, grandaj fosmaŝinoj senĉese svingis sian brakon sur la riverujo 120-130 m larĝa. La nova 57-kilometra rivero forkondukos superakvegion el Taihu-lago en Huangpu-riveron. Parto de la ĉirkaŭlaga digo 7 m alta kaj 7 m larĝa impone etendiĝas en la tereno de la urbo Huzhou. Lokanoj diris, ke la 269.63-kilometra digo ne nur povos protekti kontraŭ dekagrada.ventego kaj superakvego, kiu okazas unu fojon en 50 jaroj, sed ankaŭ ludos gravan rolon en akvokonservado kaj defluigo de superakvego de Taihu-lago. Dank' al la digo Taihu-lago fariĝos grandega akvokonservejo sur la ebenaĵo. La supro de la digo estos asfaltita kaj servos kiel grava vojo kaj vidindejo. Mi vizitis ankaŭ la 60.8-kilometran Wangyu-riveron fosatan. La rivero komenciĝas de Taihu-lago, trapasos la ŝoseon kaj fervojon inter Ŝanhajo kaj Nankino, la Grandan Kanelon, kaj fine fluos en Yangzi-riveron. La konstruado por la rivero inkluzivas pontojn, aŭtovoĵajn trefkruciĝojn, akvaj kaj ŝipajn kluzojn. La rivero forkondukos superakvegion el Taihu-lago en Yangzi-riveron aŭ kondukos akvon el Yangzi-rivero en Taihu-lagon, kiam la lago bezonos akvon. Krome la rivero ludos gravan rolon en disvolvo de navigacio.

Mi estis finonta mian vizitadon ĉe Taihu-lago. Respondeculo de gastigado de la Taihu-a Buroo diris al mi, ke la amasoj havas plenan fidon al la ordigado de Taihu-lago kaj la konstruado bone iras. Tamen, tio estas nur komenco. Pli penigaj laboroj atendas en la venontaj jaroj. La nunaj ĉefaj laboroj estas preparado por la unuaperioda konstruado kaj kolekto de mono (inkl. pruntedonon de la Monda Banko kaj monkolekton de la lokaj registaroj). ■

Luktado de handikapuloj

EN 1992 la 9-a Handikapula Sportkunveno okazis en Barcelono, Hispanio, kie antaŭ nelonge fermiĝis la sensaciaj 25-aj Olimpiaj Ludoj. Oni donis grandan atenton al la antaŭa ne pro tio, ke oni esperis de ĝi pli bonajn atingojn, sed pro tio, ke ĝiaj partoprenantoj, por diri en ia senco, montris pli grandajn firmecon, energion kaj pli sanan psikostaton.

24 ĉinaj handikapuloj-sportistoj partoprenis en la sportkunveno kaj gajnis 25 medalojn. El ilia obstina luktado kaj aplaŭdo de la rigardantaro, oni nature rememoris pri ilia malglata vivvojo. Zhao Zhenyu (Ĝaŭ Ĝenju), 180 cm alta, estas sana kaj fortika, sed perdis kruron en trafika akcidento. La 19-jara atletino Liu Yukun perdis siajn piedojn en laborakcidento. Juna Yang Shaomin el kamparo perdis sian brakon en pajlotranĉado. Kiam bela knabino Zheng Peifeng de Fujian (Fuĝjan)-provinco diplomitiĝis el elementa lernejo, ŝi blindiĝis de retino-pigmenta denaturigo. La bunta mondo mallumiĝis por ŝi...

La vivo estas longa. Kiel pasigi la estontajn tagojn? "Defiu la sorton, estu fortulo en la vivo." Jen ilia decido. Ili decidis tion post komplika kaj intensa ideologia batalo, suferinte grandajn turmentojn.

En Ŝanhajo oni faris al Liu Yukun piedajn protezojn. Laŭ la re-

guloj pri laborakcidento ŝi rajtas ĝui laborasekuron dum la tuta vivo kaj ricevi sufiĉe da mono en ĉiu monato. Iuj opiniis, ke estas pli bone por ŝi ne labori, sed ŝi ne volis preni manĝaĵon senlabore, nek vane pasigi la junecon. Ŝi avidis laboron kaj funkciis kiel planizisto, statistikisto, tajpisto kaj komputilisto. Ŝi laboris tute kiel sana homo. Pro siaj bonkondutoj ŝi estas respektata. Ŝi edziniĝis kaj vivas feliĉan vivon.

Foje ŝi hazarde konatiĝis kun sportistoj trejnantaj sin por partopreni la Handikapulan Sportkunvenon. Ŝi estis inspirita. Ŝi pensis en si: "Ankaŭ mi povos partopreni fizikan ekzercadon kaj fari tion, kion aliaj handikapuloj povas." Post tio ŝi ekzercis sin ĉefe en disko-, globo- kaj lanco-ĵetado. Farante tiujn sportojn oni devas ricevi senon kaj forton per la piedoj premantaj la teron. De kie venas tio por ŝi, kiu iras per piedaj protezoj? Ŝi povis nur ekzerci sin sidante sur genuoj por akiri senon kaj percepti ĉefajn punktojn de la ekzercoj. Ŝiaj frotvunditaj genuoj doloris ŝin, tamen ŝi daŭrigis la ekzercadon kunpremite la dentojn. Ŝi ekzercis sin ĉiumatene, ĉiuvespere kaj en ĉiuj ferioj. Dank' al la peniga ekzercado la nivelo de ŝiaj sportoj multe altiĝis. Ŝi komencis partopreni sportajn konkursojn por handikapuloj kaj akiris bonan sukceson en la Handikapula Sportkunveno de la Malproksima Oriento kaj Sud-pacifika Regiono oka-

zinta en Indonezio. Ŝi speciale vestis sin per la tradicia ĉinina robo kaj ascendis la podion por akcepti premion. Ĉi-foje ŝi rompis la mondan rekordon de disko-ĵetado je kriplula kategorio kaj gajnis oran medalon.

Ke Yang Shaomin, kiel juna handikapulo, iris el la kamparo al la internacia sporta tereno, tio estis pli malfacila. Kripliĝinte, li faris letero-ricevan kaj -elsendan laboron en la lernejo, kie lia patro laboris. Kiam li lernis en lernejo, li, saĝa kaj sportema, estis membro de korbopilka teamo de la lernejo. Eĉ post kripliĝo, en la korbopilka kampo, lin ĉiam tiklis la ludo. Li deziregis ludi kune kun la knaboj. Sed kiam korbopilko ruliĝis antaŭ lin, li neniel povis preni ĝin per unu mano. Firmvola Yang Shaomin decidis ekzerci sin. Por kapti la korbopilkon li ne domagiis la tutan tagon en ekzercado. Li ekzercis sin en kurado, saltado kaj pilko-ludo kaj fine akiris sukceson.

Li venis al Barcelono kun la deziro gajni oran medalon. Li gajnis kelkajn arĝentajn medalojn en la Olimpiaj Ludoj en Seulo. Arĝentaj medaloj ne estas malbonaj, tamen oni ludas la nacian himnon nur por sportistoj, gajnintaj oran medalon. Li fine gajnis ĉampionecon en la konkurso de trisalto, kaj tiel lia deziro realiĝis. Lia sperto estas, ke firma volo estas plej grava, sen ĝi oni sukcesas en nenio.

En la sportkunveno Zheng Pei-

feng, kiu trifoje rompis la mondan rekordon de virina disko-jetado, estas firmvola kamparana knabino. Blinda knabino okupiĝas pri sporto, tio ofte kaŭzas postdorsan kraĉadon en la kamparo, kie la konceptoj estas postĝintaj. Miskompreno por ŝi estas psika premo, tamen ŝi volis komprenon kaj subtenon de aliaj per sia konduto. Ŝi kuraĝe eniris en atletikan kampon kaj komencis sian penigan ekzercon. Por memstareco kaj sendependeco, ŝi lernis ĉiujn lecionojn por mezlernejoj en surdamutula lernejo en nur unu jaro kaj duono. Ekde 1989 ŝi lernis masaĝon. Ŝi opiniis, ke ĉiuj havas siajn malsamajn kondiĉojn kaj servas al la socio per malsamaj manieroj, tamen ĉiuj devas tutanime kaj tutforte fari sian laboron.

Se ekzercado por handikapuloj-sportistoj postulas penadon plurable pli grandan, ol ordinaraj homoj, do partopreno en intensa konkurso por ili estas eksterordinara tasko. Ni prenu sportiston pri altosaltado Zhao Hualiang kiel ekzemplon. Li, alta je 192 cm kaj peza je 80 kg, devas preni ĉiutage almenaŭ unu kg da viando kaj aliajn manĝaĵojn por havi sufiĉe da fizikaj fortoj por normalaj laboro kaj sporto. Por malpliigi sian korpopezon, laŭ la konsilo de trejnisto li manĝis nur fiŝojn kaj legomojn anstataŭ viandon tri monatojn antaŭ la konkurso. Fine lia korpopezo reduktiĝis je 10 kg.

En la komenco de la konkurso Zhao Hualiang aspektis malforte. Ŝajnis, ke gajni venkon estas mal-

facile en la konkurso kun altastaturaj kaj fortikaj rivaloj el Italio, Aŭstralio kaj Kenjo.

Antaŭ ol saltadi Zhao Hualiang kutime kriegis por sin kuraĝigi. Tamen lia unua kriego neniom helpis lin. La prova salto ne estis ideala. Kaj li ripozis kun fermitaj okuloj surtere por sin refreŝigi. En la kvara fojo li transsaltis 179 cm kaj gajnis la oran medalon.

Tamen Zhao Hualiang ne kontentiĝis pri sia sukceso. Kiam li vidis la nacian flagon malrapide leviĝanta kaj aŭdis la grandiozan nacian himnon, li ne povis sin deteni de larmoj.

Antaŭ la faktoj kiu povas dubi, ke ili estas fortuloj en la vivo. ■

ESPERANTO ELDONEJO KAJ LIBROVENDEJO SONORILO

Ekzistas 30 jarojn.

La oficiala nomo de tiu ĉi Esperanto-eldonejo kaj librovendejo estas ELDONEJO & LIBREJO SONORILO. Ĝiaj statutoj aperis en la Belga Ŝtatgazeto de la 5-a julio 1962 sub la numero 3229. Ĝi estas fondita de Belga Esperanto Instituto kaj Flandra Esperanto Instituto. En tiu tempo oni fondis ankaŭ la Belgan Esperanto Federacion. En 1962 malaperis ambaŭ institutoj. Je la 5-a de julio 1962 fondiĝis nova Esperanto librovendejo kaj eldonejo, nome ELDONEJO & LIBREJO SONORILO. Ekde la komenco SONORILO provis havi la plej malaltajn prezojn kaj tio ankoraŭ validas nun! Kiam oni organizas feston, kongreson aŭ kunvenon en Beneluks-landoj, Germanio aŭ Francio, tiam oni povas kontakti SONORILON, Doornstraat 22, B- 2610 WILRIJK Belgio. Telefonnumero 03/827.24.05. Ĝi povas tiam zorgi pri la librostando.

Ekde 1986 la personoj, kiuj loĝas en Beneluks-landoj, povas mendi siajn Esperantajn librojn an-

kaŭ ĉe ne Esperantaj lokaj librovendejoj. Ĉar ekde 1986 ELDONEJO & LIBREJO SONORILO estas membro de V.B.V.B., sekcio V.U.N.B. En 1987, 1988 kaj 1989 ELDONEJO & LIBREJO SONORILO staris kun Esperantaj libroj je BOEKENBEURS VOOR VLAANDEREN (Libroborso por Flandrujo). SONORILO staris du fojojn je FRANKFURTER BUCHEMESSE. En 1990 ankaŭ SONORILO staris je FRANKFURTER BUCHEMESSE kaj kun la aliaj partoprenantoj (eldonistoj) kiuj estas membro de V.B.V.B. en kunlaboro de Ministerio de Flandrujo aperigis "New Books from Flanders". En tiu ĉi libreto aperis 1 paĝo de anonco de ELDONEJO & LIBREJO SONORILO. Tiu ĉi libreto estis donitaj al la vizitantoj de FRANKFURTER BUCHEMESSE. Kiam oni vizitas la librovendejon en Wilrijk, oni povas ekde 1991 ankaŭ pagi per kreditkarto VISA.

ESP-NOVAĴOJ

● En la 14-a de oktobro 1992 la E-Asocio de Yangzhou (Jangĝou), Jiangsu (Ĝjangsu)-provinco okazigis jarkunvenon en la scienc-teknika centro de la urbo por resumi sian laboron en 1992 kaj honori aktivulojn. Krome, la kunveno komunikis la direktivon de la urba civila buroo permesi al societoj establi entreprenojn kaj alvokis la membrojn ekagi por fondi ekonomikan organizon. Nun la Yangzhou-a E-Asocio jam havas masaĝan kaj akupunkturmoksan kuracejon. La Yangzhou-a Esperanto-traduka Fako, fondita en 1989, donis nemalmultan subvencion al la asocio por E-movado.

● La 18-an de oktobro Yi'an-gubernio de Heilongjiang (Hejlongĝjang)-provinco okazigis kunvenon por festi la 5-an datrevenon de la fondiĝo de sia E-asocio. En la kunveno oni fondis filion de la E-asocio en la Yi'an-a Normala Lernejo.

● Unu monaton post la ekfunkcio de la unua ĉina Esperanta konsultiĝa telefono en Shenyang en septembro 1992, la mastro ricevis pli ol 100 telefonvoĉojn de interesigantoj de Esper-

inaŭguriĝis je la 17-a de septembro 1992 en la Ekonomia Kolegio de Oficistoj kaj Laboristoj en la urbo.

● En septembro kaj oktobro 1992 la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis poŝtmarkoseriojn pri freskoj de Dunhuang (4-a parto), la 20-a datreveno de normaligo de la diplomatiaj rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio, Ma Zu, la 14-a Tutlanda Kongreso de KPC kaj la bona kadro de KPC — Jiao Yulu (Ĝjaŭ Julu). La Poŝtmarka Kompanio de Haikou de Hainan-provinco uzis Esperantan poŝtstampon en la unua tago. La stampoj por la kvin serioj estas projektitaj de Zhang Linrui (Ĝang Linĵuj).

● Dum tagoj 25.7 — 2.8.1992 Esperanto-Sekcio de AĈSF (Asocio de Ĉeĥoslovakaj Filatelistoj) organizis en la sudmoravia urbo Strážnice, Ĉeĥoslovakio, la Internacian Esperanto-Filatelan Ekspozicion, kadre de festotagoj om-




Partoprenantoj de la 77-a UK en Esperantoparko de Vieno

agio la poŝto uzadis du E-afrankmaŝin-stampilojn. La ekspozicion vizitis personoj el pli ol 30 landoj de la tuta mondo.

● Lastatempe fondiĝis en Irano la Tutmonda Islama Movado Esperantista (TIME), kiun kreis kaj prizorgas s-ro Gholam R. Abadi. TIME eklaboras kun naŭ kunlaborantoj kaj bonvenigas Esperantajn referaĵojn, bultenojn, librojn kaj gazetojn el la tuta mondo, kaj ankaŭ la komentojn, proponojn, kunlabormesaĝojn, helpon kaj korespondataĵojn de la Esperantaj organizaĵoj, eldonejoj, fakuloj k.a. La adreso: Gholam R. Abadi, P.O. Box 345-63515, Bandar Mahshahr I. R. Irano.

● La plej prestiĝa konkurso de la movado ree invitas al kreado de originalaj kontribuoj al la Esperanta kulturo. Sep diversaj branĉoj atendas konkursaĵojn, kies kremon oni distingas per monpremioj, pli altaj ol pasintjare. Ĉi-foje UEA aparte alvokas ĉiujn muzikemajn e-istojn — unuopulojn kaj grupojn — por partopreno en la branĉo de kantoj. La muzika Esperanto-kulturo disfloris en la lastaj jaroj, sed tio ne montriĝis kiel pli vigla partopreno en la Belartaj Konkursoj. La konkursaĵoj de ĉiuj branĉoj devas esti novaj kaj (escepte de la infanlibroj) nepublikigitaj. La konkursaĵojn oni sendu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Detalaj kondiĉoj kaj regularo haveblas kontraŭ unu respondkuponon ĉe la adreso.



Esperantaj poŝtstampoj uzitaj de la Poŝtmarka Kompanio de Haikou

anto de Shandong, Henan, Tianjin (Tjangĝin) kaj aliaj provincoj kaj urboj kaj respondis iliajn demandojn pri Esperanto.

● Sub la aŭspicioj de la E-Asocio de Zaozhuang (Zaŭĝuang), Shandong-provinco, la Esperanta eksperimenta kurso

orumitan medalon — gajnis la ekspoziciaĵo "Esperanto en filatelo" de samideano Vlada Hasala el Strážnice. Grandan arĝentumitan medalon gajnis "Esperanto — Internacia Lingvo kaj ĝia reago en filatelo" de samideano Alois Jakubec el Hranice. Dum la ekspozicio

WANG HANPING:

Geesperantistoj intervizitadu

— Intervjuo al Takaŝi Agou, ĝenerala
sekretario de Esperanto-Propaganda
Asocio de Oomoto

EN oktobro 1988 mi unuafoje intervidiĝis kun japana samideano s-ro Takaŝi Agou, ĝenerala sekretario de Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto (EPA). Tiutempe mi lernis Esperanton en la Ŝanhaja Universitato de Fremdlingvaj Studoj kaj li estis vicestro de la karavano de la Junulara Fako de Oomoto al Ĉinio. En Ŝanhajo ni E-kursanoj kunsidis kun junaj esperantistoj de Oomoto. Ili donacis al ni po unu T-ĉemizon kun Esperantaj vortoj "Junulara Fako de Oomoto" kiel memoraĵon.


4 jaroj rapide forpasis. Aŭguste 1992, s-ro Takaŝi Agou venis al Qingdao por partopreni en la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto. Dum la kongreso mi renkontis lin plurfoje, tamen pro manko de tempo ni ne multe babilis. Nur antaŭvespere de lia forlaso de Qingdao ni interparolis duonhoron. Por diri ĝuste, tio ja ne estis libera interparolo sed hasta intervjuo. Kiel raportisto de EPC, mi faris kelkajn demandojn, kaj li respondis. Jen nia interparolo:

Wang: Saluton, s-ro Takaŝi Agou! Kiom da geesperantistoj de Oomoto partoprenas en la kongreso? Bonvole parolu pri via impresoj pri la kongreso.

Agou: 22 oomotanoj partoprenas. Nia delegacio aliĝas al la karavano de la Internacia Kultura Laborejo organizita de s-ro Yosimi Umeda. Mi pensas, ke ĉi-foje ne nur veteranoj sed ankaŭ komencantoj venis al la pacifika kongreso por ĝui la etoson de internacieco, internacia kompreniĝo pere de Esperanto. Rigardante iliajn vizaĝojn, mi profunde impresiĝis, ke tiu ĉi kongreso estas bona ŝanco por koni, kio estas Esperantujo, kun kiu celo esperantistoj aktivigas en diversaj lokoj de la mondo. Do mi pensas, ke ili aliĝos al Esperantujo baldaŭ poste. Jes, el tiu senco tiu ĉi kongreso estas treege impona kaj signifoplena. Tio estas mia propra impresoj. La kongresa organizado estas treege bona kaj la programo tre glate iras ĝis hodiaŭ.

Wang: Mi ĉeestis vian fakan kunsidon okazigitan en tiu ĉi kongreso. Ĝi vekis intereson de multaj kongresanoj. Ĉu vi bonvolus diri al mi, kiel EPA faris kulturajn kaj aliajn internaciajn interŝanĝojn pere de Esperanto?

Agou: Jes, ni jam efektive faras tian laboron pere



Ĉinaj kaj japanaj esperantistoj interparolas. La unua de dekstre estas s-ro Takaŝi Agou.

de Esperanto kaj tiu estas unu el la celoj de nia agado. Tamen la ĉefa celo de nia asocio estas plimultiĝi esperantistojn en nia lando kaj havi bonan kontakton kun aliaj Esperantaj organizaĵoj en la mondo. Pro tio ni ĉiujare sendas delegacion al UK por ke ni okazigu fakan kunsidon de Oomoto. Antaŭ 5 jaroj ni unuafoje sendis delegacion al Ĉinio por ke ni EPA-anoj havu apartan kontakton kun ĉinaj geesperantistoj. Ili vizitis tri urbojn, Pekinon, Qingdao kaj Ŝanhajon. Ekde tiam ni ĉiujare sendas similajn delegaciojn al Koreio kaj Rusio. Maje ĉi-jare ni ĉeestis la Internacian Simpozion de Esperanto en Vladivostoko.

Wang: Mi informiĝis, ke en la venonta jaro estos centjariĝo de Oomoto, ĉu vere?

Agou: Ne. La centjariĝo estas en tiu ĉi jaro. Memore al ĝi, ni invitos la 80-an Kongreson de Japanaj Esperantistoj al nia urbo Kameoka, ĉar la venonta jaro estos la 70-a jubilea jaro de la fondiĝo de EPA. Do, mi esperas, ke laŭeble multaj ĉinaj esperantistoj partoprenos ĝin. Ankaŭ ni invitos oficiale reprezentantojn de ĈEL k.a.

Reveninte hejmen ni tuj eklaboros por la organizado de la kongreso, ĉar ĝi bezonas almenaŭ unujaran preparadon por sukcesigi ĝin. Do tio signifas, ke mi multe klopodu serĉi kiamaniere EPA kaj la kongreso povos akiri multajn eksterlandajn esperantistojn. Tio estas granda elemento por sukcesigi la kongreson. Ni deziras sendi diversajn leterojn kaj interŝanĝi informojn por serĉi la aferon.

Wang: Vi vizitis Ĉinion 4 fojojn. Kiun impreson pri la ĉina E-movado vi havas?

Agou: Do, mi pensas, ke en la ĉina E-movado troviĝas multaj gejunuloj. Al mi ŝajnas, kvankam ili ankoraŭ estas komencantoj aŭ komencintoj, tamen se ili diligente lernos Esperanton plu, la movado de Esperanto en Ĉinio devos esti plej potenca en Azio. Do, pro tio ni EPA-anoj deziras havi bonan kontakton kun ĉinaj gejunuloj per Esperanto.

Wang: Ĉu vi bonvolus koncize paroli pri via esperantista kariero?

Agou: Antaŭ 18 jaroj mi eklernis Esperanton, tiam mi estis 20-jara, pro la fakto, ke mi estas membro de la tria generacio de Oomoto, laŭ kies instruoj, la

SHANG JUNYI:

Vojaĝo en sep eŭropaj landoj

DE la 25-a de majo ĝis la 10-a de junio 1992, la 3-membra delegacio de Chengde-aj esperantistoj de Ĉinio, vizitis Pollandon, Litovion, Estonion, Finnlandon, Rusion, Latvion kaj Germanion.

Dank' al Esperanto, nia delegacio vizitis la 7 landojn en nur 17 tagoj kaj sukcesis en akademia interŝanĝo kaj komercaj kontaktoj.

Nuntempe, preskaŭ en ĉiuj gravaj eŭropaj urboj viglas esperantistoj kaj Esperantaj societoj. Dum nia vizitado, ni estis ofte helpataj de la lokaj E-asocioj kaj afablaj esperantistoj.

En Litovio kaj Estonio estas parolata la rusa lingvo. Dank' al helpo de s-ro Marijus Dilba, membro de la Litovia E-Asocio, ni nin liberigis el la lingva baro. Li kaj lia edzino helpis nin en aĉeto de fervoja bileto, serĉo de hotelo kaj kelkfoje eĉ marĉandis por ni kun ŝoforo de taksio. Dum 5 tagoj s-ro Marijus Dilba funkciis kiel nia ĉiĉerono, lia edzino kun ĝojo proponis, ke li akompanu nin al Tallin, ĉefurbo de Estonio, kaj ripete diris al sia edzo: "Vi ne revenu antaŭ ol vi akiros ŝipbiletojn al Finnlando por la ĉinaj amikoj."

Oni povas diri, ke estas memorindaj miaj 7 tagoj en Litovio, precipe neforgesebla estas la adiaŭo de la esperantistoj en stacidomo: ni manpremis unu alian kaj diris kun emocio: "Per Esperanto, por monda paco. Ĝis revido! Ĝis revido! Ĝis revido!"

Kutime finnoj ferias en junio kaj julio. Kiam ni estis en Finnlando, en la oficejo de la E-Asocio de



Chengde-aj kaj litovaj esperantistoj

Finnlando ni vidis nur 2 respondeculojn kaj kelkajn esperantistojn, inter ili estis 70-jara veterana esperantisto Milton Jöse. Altastatura, sana kaj forta, li biciklis al la haveno por bonvenigi nin. Aranginte veturilon por ni, li bicikle reiris al la oficejo de la asocio. Preninte tason da trinkaĵo, kiun ni kunportis el Chengde, li denove iris serĉi loĝejon por ni malgraŭ laceco.

Dum la vojaĝo ni kontaktiĝis kun esperantistoj de tiuj landoj kaj ekhavis rilatojn kun 12 E-asocioj, kies membroj okupiĝas pri diversaj profesioj kaj aktive praktikas Esperanton en sia faka kampo.

La prezidanto de la E-Asocio de Finnlando informis al ni, ke la E-asocio fondiĝis en 1907. Ĝi havas nun 13 lokajn kaj fakajn filiojn kun pli ol mil membroj. En februaro kaj septembro, la asocio okazigas kunvenon por diskuti pri la temo de diversaj fakoj kaj aliaj aferoj. En 1922 kaj 1969, okazis UK en Helsinki. Nun, ĝi preparas la 80-an UK de 1995.

Dum la kultura kaj scienca interŝanĝo kun la 7 landoj, ni kontaktiĝis ankaŭ kun la tieaj ekonomiaj organizoj kaj komercistoj pere de Esperanto. Ni vizitis tieajn fabrikojn, entreprenojn, vendejojn kaj foirojn. Dank' al helpo de la tieaj E-asocioj, ni faris 4 ekonomiajn kaj komercajn memorandojn kun litoviaj kaj estoniaj entreprenoj kaj registaraj departementoj.

La vojaĝo en la sep eŭropaj landoj plie konigis al ni la gravecon de Esperanto kiel internacia helpa lingvo, en la interkomunikado de la popoloj parolantaj malsamajn lingvojn. ■

oomotanoj lernu Esperanton por ke ĉiuj homoj estu egalaj kaj ankaŭ komprenigu kun la aliaj. Mi estis elektita kiel komitatano de UEA. Antaŭ 9 jaroj okaze de la 60-jara jubileo de EPA ni invitis la 70-an Kongreson de Japanaj Esperantistoj al nia urbo Kameoka, kaj mi tiam estis ĝenerala sekretario de LKK. Nun mi estas redaktoro de la revuo en Esperanto "Oomoto".

Wang: Laŭ via opinio, kiel la ĉinaj kaj japanaj esperantistoj daŭre disvolvos la amikan interŝanĝon kaj kontakton?

Agou: Mi pensas, ke ekonomikistoj bone utiligu Esperanton kiel komunan interkomprenilon. Tio estas plej grava elemento por diskonigi Esperanton en

la mondo. Se ĝi estas tre bone uzata, la lingvo Esperanto pli facile diskonigos kaj eĉ homo povos profiti de Esperanto. Kaj ankaŭ gejunuloj ofte vizitu eksterlande kaj ankaŭ invitu eksterlandajn samideanojn al sia propra urbo per Esperanto. Partopreninte la vladivostokan simpozion en majo, mi impresiĝis, ke ĉirkaŭ la Japana Maro kaj Pacifiko jam stabiĝis ĉefaj centroj de diverslandaj E-movadoj, ekz. Pekino, Seulo, Niigata, Vladivostoko, Qingdao kaj aliaj. Qingdao, Ŝanhajo, Niigata kaj Vladivostoko estas havenurboj. Ni eĉ povas havi tian novan ideon, ke per ŝipo ni vizitu tiujn 4 havenurbojn dum semajnoj, kaj sur la ŝipo ni havu kongreson. Tiu estas treege alloga projekto.

Wang: Dankon.

La edzino de la Luno

de ROBERT ROBINSON (Aŭstralio)

PRI la viro en la luno estas multaj rakontoj. Sed popola rakonto el la eta insulo en Pacifiko, Naŭruo, diras ke virino — ne viro — estas en la luno. Ĉi tiu rakonto rakontas, kiel ŝi iris tien.

Antaŭ tre longe sur la eta insulo de Naŭruo vivis juna kaj bela fraŭlino, kiu kun sia avino loĝis sub tre alta arbo. Iutage la avino diris al ŝi: “Mi deziras, ke vi edziniĝu. Morgaŭ antaŭ la sunleviĝo ellitiĝu, ŝmiru delikatan kokosan oleon sur via korpo kaj metu belajn florojn en vian hararon.”

La sekvan matenon ĉe la aŭroro la fraŭlino eksaltis el la lito kaj iris al la bazo de la plej alta arbo sur la insulo. La avino diris al ŝi: “Vi scias, ke la niĉoj fositaj en la arbotrunko atingas ĝis la arbosupro. Ĝis nun neniu havas sufiĉan kuraĝon grimpi tra la arboniĉoj ĝis la arbosupro. Mi diras magiajn vortojn por protekti vin, dum vi grimpas sur la arbon.”

La avino eldiris la magiajn vortojn kaj adiaŭtis sian nepinon.

Pere de tiuj magiaj vortoj la fraŭlino facile grimpis sur la altan arbon. Kiam ŝi atingis la arbosupron, ŝi vidis kabaneton. Apud la kabaneto sidis blinda grandaĝulino, kiu boligis siropon en kokosoŝeloj sur tre varmegaj ŝtonoj. Ŝi kirlis la siropon ofte por ne karbigi ĝin.



Dume ŝi ankaŭ kalkuladis la kokosoŝelojn.

Rampe alproksimiĝis al ŝi la fraŭlino. Ĉiufoje kiam ŝi finis la kalkuladon, la fraŭlino forprenis kelkajn kokosoŝelojn. Post kelkaj minutoj la blindulino konstatis, ke la nombro de la ŝeloj estis malpliiganta iom post iom. Kiam la fraŭlino estis prenanta alian kokosoŝelon, ŝi kaptis ŝian brakon.

“Kiu havas la malrespekton ŝteli siropon de blindulino?” ŝi koleris. “Pro via fiago vi suferos. Kiam miaj filoj Suno, Luno kaj Tondro revenos, ili mortigos vin.”

“Bonvolu liberigi mian brakon,” diris la fraŭlino, “kaj mi resanigos viajn okulojn.”

“Multaj homoj tion provis, sed neniu el ili sukcesis,” respondis la blindulino.

“Lasu min provi,” la fraŭlino petis, “kaj, se mi malsukcesus, vi povus puni min laŭ via plaĉo.”

Fine la blindulino liberigis la brakon de la fraŭlino. Ĉi tiu tenis la vizaĝon de la blindulino per siaj manoj, murmurante plurajn magiajn vortojn. Preskaŭ tuj el la okuloj de la blindulino rampis lacertoj kaj skaraboj. Post kelke da minutoj denove ŝi posedis la vidpovon.

Feliĉa estis la grandaĝulino. Ŝi ĝoje aplaŭdis: “La naturo estas tre belega. De nun eblas por mi vidi la vizaĝon de miaj filoj. Sed mi devas kaŝi vin. Se miaj filoj rimarkos vin, ili mortigos vin.”

Rapide ŝi kaŝis la fraŭlinon. Baldaŭ Suno revenis al la kabaneto. Li estis tiel helega, ke lia patrino ne povis rigardi lin.

Mallonge poste ankaŭ la aliaj du filoj, Tondro kaj Luno, revenis al la kabaneto. Kiam la grandaĝulino rigardis Lunon, ŝi pensis, ke li estas milda kaj bela. Luno proksimiĝis al sia patrino kaj diris: “Panjo, kial vi rigardas nin, kvazaŭ vi povus vidi nin?”

“Vere mi povas vidi vin kaj Tondron,” diris la patrino. “Sed Suno estas tiel helega, ke miaj okuloj doloras, kiam mi rigardas lin.”

“Panjo, kia estas odoro tia? Ĝi elspiras same kiel homa odoro.”

“Jes, ĝi estas la odoro de homo,” la patrino respondis. “Belega junulino estas proksime. Ŝi kuracis mian blindecon. Ŝi estas belega kaj unu el vi edziĝu al ŝi.”

“Jes,” diris la filoj. “Lasu la junulinon veni ĉi tien kaj ni decidu, kiu el ni edziĝu al ŝi.” La patrino kondukis la fraŭlinon el la kaŝejo.

Ŝi diris al la fraŭlino: “Elektu unu el miaj filoj. Kiun vi deziras kiel vian edzon?”

Dum kelkaj minutoj la fraŭlino zorge rigardis la tri filojn...

“Mi ne povas edziniĝi al Suno,” ŝi diris, “ĉar li estas tro varmega kaj liaj briloj blindigos min. Tondro estas tro ŝtormema. Sed Luno aspektas milde kaj serene, kaj mi deziras edziniĝi al li.”

Luno tre ĝojis pro ŝiaj vortoj. Tuj li enbrakigis sian novedzinon kaj la feliĉa geedza paro velis tra la ĉielo. Ekde tiam, la fraŭlino rigardas malsupren al la Tero kiel la feliĉa edzino de la Luno. ■

Surplacaj artoj en Tianjin

Teksto de HU YUN

Fotoj de CHEN ZONGLIE

EN Ĉinio estas diversaj popolaj amuzoj, kiaj drako-danco, leonodanco, jangge-danco, stilzo-iro, ludo per surtera boato, tamburado kaj gongado, kiuj ĉiuj plaĉas al la ĉinoj. Ili, kiel kolektiva amuza aktivado, okazas, ĝenerale, por kulto aŭ preĝo, sed plejofte por celebrado de riĉa rikolto kaj festo. Dekkelkaj homoj grupe ludas kun dancanta ŝtofdrako longa je kelkdek m. Iam dekoj, centoj, eĉ miloj da homoj kune dancas jangge-dancon, permane svingante ruĝan silk-rubandon. La aktivadoj, kvankam simplaj kaj antikvecaj, alportas grandan ĝojon al ĉinaj popolanoj, precipe al tiuj en la kamparo, kie subevolvas kultura vivo. Kaj eĉ hodiaŭ, kiam okazas drakodanco, multaj loĝantoj konkure rigardas la spektaklon. Kaj la kolektiva amuza aktivado tute ne mankiĝblas en ĉiuj festotagoj.

Nun ankaŭ loĝantoj de Tianjin en norda Ĉinio okazigas tian aktivadon kaj donis al ĝi la belan nomon Surplaca Arto. Per tio ili malfermis novan terenon por la popola amuzo propra al Ĉinio. Estas neatendite, ke urbananojn ravis la prezentado de la 24 teamoj el diversaj partoj de la lando.

Partoprenado de granda amaso da prezentantoj kaj spektantoj karakterizas la popolan amuzon. La prezentantoj kaj granda nombro da spektantoj

estas samlokanoj. En Songdinastio (960 — 1279 p.K.) oni priskribis la spektaklon, ke ĝi etendiĝas pli ol 5 km kaj oni frapas tamburon kaj ludas flagleton, kion multe ĝuis la rigardantoj. En Tianjin, kvankam la prezentantoj ne estis lokanoj, tamen la aktivado estis freŝa por la urbanoj. Ĝuste pro tio, svarmis rigardantoj tie, kie ili prezentis, ĉu en parko, ĉu sur stadionoj, ĉu sur strato. Estis la unua fojo por Ĉinio okazigi tian aktivadon en urbo.

La aktivado havas densan lokan guston. Kaj malsamajn stilojn havas eĉ samspeca aktivado pro diferenco inter regionoj aŭ naciaj moroj. Ne mankas ludoj de tamburoj kaj gongoj, kiel ekzemple, majesta tamburado kaj gongado de Shanxi (Ŝanŝji), porpaca tamburado kaj gongado de Gansu, talitamburino de Shaanxi (Ŝenŝji) kaj bataltamburado de Hebei. Ĉiuj ludmanieroj estas ritmoplenaj kaj kostumoj de prezentantoj plaĉas al la okuloj. La sono jen agrablas, jen surdigas, jen inspiras.

La malsameco inter la surplaca arto kaj la origina kolektiva amuza aktivado kuŝas en tio, ke per la antaŭa oni kolektas diverslokajn popolajn amuzojn sur placo de la urbo. Tie, ne pluvidiĝas la diferenco inter regionoj, sed anstataŭe, intensiĝas la etoso de la ĉina kulturo, kio sentigis ĝiajn brilecon kaj profundan influon. Ĉiuj programejoj de la teamoj devenas de la

popolo, sed diferencas de ordinara kolektiva amuzado per kvalito. La prilaboritaj programeroj plenas je loka gusto kaj forta inspiro de la popola arto, kaj samtempe taŭgas por prezenti sur scenejo. Aliflanke, la trejnintaj prezentantoj multe perfektigis sian ludarton, tiel ke ĉiuj spektantoj aplaŭdis la mirindan prezentadon senescepte.

La brustofrapado estas loka danco tre ŝatata de la loĝantoj de suda Fujian (Fugĵan) en suda Ĉinio, sed ĝi estas tute fremda por la Tianjin-anoj en norda Ĉinio. Ok prezentantoj de la antaŭa parto de la teamo portas ŝultre du fornojn, en kiuj flamas fajro, kaj la sekvantoj kun nuda torso ambaŭmane frapas sur la polmoj, brustoj, ripoj kaj femuroj, tiel aŭdiĝas ok sonoj. La danco esprimas interesan vivon de la lokanoj.

Prezentantoj en tibetana robo el la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo dancis Zhaxixueba(-Ĝaŝjiŝueba)-dancon. Ilia bruna vizaĝo montris la ardecon de la suno super la altebenaĵo. La senĝenaj dancmovoj elspiris ĝojon de la lokanoj pro bonaj aŭspicioj en festotago. El Sanguozhai(Sanguoĝaj)-vilaĝo de Henan-provinco en centra Ĉinio, vilaĝanoj venis al Tianjin. Ili tamburante eniris sur la placon. Laŭdire, en la antikveco multaj junuloj de la vilaĝo servis en armeo. Tiam oni tamburis por montri sian forton. Nun la ritmaj kaj fortaj frapado kaj



Danco sur stilzoj

Foto de JIANG YONGGANG

kriado ankoraŭ elspiras ian hercecon de armeanoj.

Jen rapidis sur la placon 18 junulinoj el Yongkang-gubernio de Zhejiang (Ĝeĝjang)-provinco, sub formo de papilioj. Ili portis kvinkolorajn flugilojn

kaj dancante sekvis la Flordion en akompano de tradicia ĉina muziko, kio figuris pulsantan printempon sur la tero. Huj-oj de Tianjin facilamove dancis kun glavo en la mano. Ili lete svingis glavojn pezajn je pli ol

50 kg kaj la rigardantoj dronis en arta ĝuo.


La drako-danco antaŭe interesis nur kamparanojn, sed nun ĝi plaĉas ankaŭ al Tianjinanoj. Ĝuante brilan popolan arton, ĉiuj rigardantoj estis inspiritaj de nova temperamento. ■

Virinoj tamburantaj



Prezentado





La Silka Vojo hodiaŭ

Teksto kaj fotoj de DA WEI

Sur la Silka Vojo

ANTAŬ 1 800 jaroj, kiam la romia imperiestro Cezaro en eleganta silka robo iris al teatro kaj la ĉeestantaj nobeloj tre admiris tion, la ĉinoj jam vaste kulturis morusarbojn kaj bredis silkraŭpojn. Poste la antikvaj ĉinaj nordokcidentaj nacioj malfermis internacian terojon kun silka komerco kiel la ĉefa. Iu germano nomis ĝin Silka Vojo.

La antikva Silka Vojo komenciĝis de la antikva ĉina ĉefurbo Chang'an (nun Xi'an), trairis Gansu-provincon kaj Xinjiang (Ŝingĵang) kaj fine atingis la antikvan Romon, kun totala longo de pli ol 10 000 kilometroj. Kaj la parto en Gansu kun longo de 1 600 kilometroj estas la plej fama.

Dum la Unua Ĉina Festivalo de Silka Vojo okazinta en septembro 1992 mi iris de Lanzhou al Dunhuang laŭ tiu antikva vojo. Mi ekscitiĝis pro ĝiaj pejzaĝoj kaj des pli ĝojis pro ĝia nova aspekto.

EVOLUANTA URBO SUR LA SILKA VOJO

Malferminte mapon de Ĉinio, vi trovos, ke Lanzhou (Langŝou), la ĉefurbo de Gansu, situas en la geometria centro de la mapo. De antikve Lanzhou estis grava trafika nodo kaj komerca urbo sur la Silka Vojo. Tiutempe silkaĵoj, porcelanaĵoj kaj teo de centra Ĉinio senĉese transportiĝis okcidenten tra Lanzhou kaj ĉevaloj, kameloj kaj drogoj senĉese transportiĝis internen de Ĉinio tra ĝi.

Nun Lanzhou kun 2.6 milionoj da loĝantoj jam fariĝis la plej granda industria, scienc-teknika kaj kultura urbo en la supra baseno de la Flava Rivero. Ĝia trafiko estas multe pli facila ol antaŭe: Nun en la urbo funkcias 13 aerlinioj al la ĉefaj urboj de la lando kaj funkcias unu aerlinio al Hongkongo; 8 grandaj ŝoseoj kondukas en ĉiuj direktoj; kaj 4 trunkaj fervojoj kunligas ĝin kun aliaj lokoj de la lando.

Sur la antaŭa Silka Vojo estas transportataj tagnocte ne nur silkaĵoj, sed ankaŭ multaj industriaj produktaĵoj de Gansu, ekz. petrolaj, nikelaj, ŝtalaj, aluminiakaj kaj kemiaj, kaj aliflanke industriaj instalaĵoj kaj altteknikaj produktaĵoj bezonataj de Gansu estas transportataj al ĝi per la vojo. En la lastaj dek jaroj la ekonomio de la sudorient-marbordaj urboj rapide disvolviĝis dank' al la favora politiko de la

reformado kaj pord-malfermo kaj bonaj geografiaj kondiĉoj, sed tiu de Lanzhou en nordokcidenta parto de Ĉinio estis postrestanta. Laŭ statistiko, en 1991 la pokapa produktovalorero kaj pokapa enspezo de la loĝantoj de Gansu estis nur 63% kaj 70% kiom tiuj de la tutlanda loĝantaro. Sed ne deprimiĝis la Lanzhou-anoj kun 2 000-jara historio de silkvoja ekonomio kaj kulturo. Ili unuflanke streĉe konstruas industriajn, energiajn, trafikajn kaj loĝkvartalajn instalaĵojn kaj ekspluatas riĉfontojn de mineraloj kaj aliflanke serĉas ŝancon por kuratingi la marbordajn urbojn.

KORIDORO OKCIDENTE DE LA FLAVA RIVERO EN VERDO

Mi aŭte veturis de Lanzhou okcidenten laŭ la Silka Vojo.

Tiu nova ekspresa ŝoseo inter Lanzhou kaj Dunhuang, kie troviĝas Mogao-kavernaro, fame konata trezorejo de arto, estas glata kaj pura, kaj ambaŭflanke de ĝi prosperas verdaj poploj (*Populus Simonii*). La aŭto finis la vojon en 12 horoj.

Mi transiris Wuqiao (Uĉĵaŭ)-monton kun kaprica vetero, kaj aperis antaŭ mi vasta bela ebenaĵo. Tie estas Wuwei, la orienta fino de la fame konata Koridoro Okcidente de la Flava Rivero.

Je mencio de Wuwei oni ekpensas, ke en la 60-aj jaroj oni elfosis tie raran kupran ĉevalon de Handinastio (206 a.K. — 220 p.K.). Ĝia bela formo kaj arta konstruo mirigis la rigardantojn. Poste ĝia figuro fariĝis emblemo de la Ĉina Turisma Servo.

Inter Wuwei kaj Dunhuang etendiĝas 1 000-kilometra zono kun interligitaj oazoj riĉaj je akvo kaj agrikulturaj kaj brutaj produktaĵoj. De antikve la loko estas grava pasejo al Xinjiang, centra kaj okcidenta Azio. Wuwei kaj Zhangye (Ĝangje) estas relative riĉaj, tial la lokanoj diris: "Wuwei estas arĝento kaj Zhangye oro."

Antaŭe la kamparanoj de Wuwei okupiĝis ĉefe pri kulturado de grenplantoj. Sed nun la tieaj junaj kamparanoj bone komprenas la komercaĵan ekonomion kaj ilia penso estas vigla. Laŭ la merkata bezono ili kulturis unue sunflorojn kaj poste fenko-

lojn kaj Lanzhou-melonojn kaj liveris nigrajn semojn de akvomelonoj kiel eksportaĵon. Iu gubernio kultur- as jam 10 000 hektarojn da kampoj de akvomelonoj kun nigraj semoj.

Sur la vojo inter Wuwei kaj Zhangye staras pli ol 200 kilometroj da maldensaj arboj, sur sabla plaĝo kreskas peganoj (*Peganum harmola*) kaj sur la mal- proksima Qilian(Ĉjiljan)-monto estas neĝo malklare videbla. Sed sur la oazo de Zhangye fluas riveroj kaj kreskas arboj. Zhangye, riĉa je akvo, ĉiam estas bazo de komerca greno de Gansu. Ĝiaj loĝantoj venkis dezerton, kultur- as frukt- arbojn, flegas paŝtejon kaj prilaboras altproduktajn kampojn. Nun, kun la dis- volviĝo de industrio kaj komerca ekonomio, Zhangye jam fariĝis loko kun brila perspektivo.

DE ŜTALA URBO AL TURISMA LOKO

La antikva urbo Jiuquan (Ĝiŭĉjŭan) situanta en la meza parto de la Koridoro Okcidente de la Flava Rivero estas fama pro siaj jadaj glasoj. Tia diafana glaso kun naturaj vejnoj estas mane farita kaj fariĝis memoraĵo nemalhavebla por la turistoj. La vojoj de Jiuquan kondukas al ĉiuj lokoj kun televida stacio, radiostacio kaj centro de televido de fermita cirkvito.

En la urbo Jiayuguan (Ĝjajugŭan), 20 kilometrojn for de Jiuquan, staras turo de Jiayuguan-pasejo, la okcidenta fino de la Granda Muro. En la 50-aj jaroj tie estis dezerto. Dank' al la stablo kaj disvolvo de la Jiuquan-a Ŝtala Kompanio, Jiayuguan fariĝis nova industria kaj turisma urbo kun 110 000 loĝantoj, sed la Jiuquan-a Ŝtala Kompanio fariĝis entrepreno kun ŝuldoj. Respondeculo de la kompanio diris, ke kvan- kam ĉiujare ili devas redoni pruntitan monon, tamen kun la ŝanĝiĝo de la ŝtata politiko ilia kompanio ekpraktikis laŭkon- traktan laboran sistemon kaj sin turnis al la merkata ekonomio. Laŭ takso, en 1995 la kompanio produktos 1.1 milionojn da tunoj da ŝtalo (nun nur 500 000 tunojn) kaj fariĝos vere la plej granda ŝtala kombinato en nordokcidenta Ĉinio.

La vojo inter Jiayuguan-pasejo kaj Dunhuang estas 380 kilometrojn longa. Post kiam nia aŭto traveturis Yumen-urbeton, antaŭ niaj okuloj prezentigis denove de- zerto. Tage tie estis seke kaj varme, kaj nia aŭto dufoje perturbiĝis pro tro alta temperaturo de akvo en la radiatoro.

Mi miris, ke Dunhuang estas movoplana. Ĝiaj hoteloj estas moder- ne dekoraciitaj kaj ĝin vizitas multaj turistoj. La belaj pejzaĝoj de Mogao-kavernaro, Mingsha-

monto kaj la Lunarka Fonto alportis al Dunhuang disvolviĝon kaj prosperon de ĝia ekonomio. Mi infor- miĝis, ke la registaro de Gansu sankciis konstruadon de Dunhuang en turisman kaj ekonomian disvolvan regionon kaj permesis, ke ĝi plirapidigu sian disvolvi- ĝon profitante specifajn politikojn de la marbordaj specialaj ekonomiaj distriktoj kaj malfermitaj urboj.

FERVOJO TRA EŬRAZIO


La 12-an de septembro 1990 naskiĝis nova fervojo tra Eŭrazio, post kiam oni interligis la Lanzhou- Xinjiang-an Fervojon kaj la Turkmenia-Siberian Fer- voj- on. Ĝi estas fame konata nova eŭrazia kontinenta ponto.

Kontinenta ponto estas internacia fervojo ligita kun maraj linioj ĉe du finoj de kontinento(j) por facila trafiko. La nova eŭrazia kontinenta ponto komencigis de Lianyungan-haveno de Ĉinio en oriento kaj etendiĝas ĝis Roterdamo de Nederlando en okcidento tra 9 landoj de Azio kaj Eŭropo, kun totala longo de 14 000 kilometroj.

Ĝi alportis al Gansu fortunon. La Gansu-anoj de- cidis utiligi la ponton por iri sur vojon de ekonomia impeto. Kaj Lanzhou kaptis la ŝancon tuj okazigi la Unuan Ĉinan Festivalon de Silka Vojo kun aktivadoj de kulturo, turismo kaj komerco. S-ro Ke Maosheng, urbestro de Lanzhou, malkaŝe diris, ke ili okazigis la festivalon, por ke la mondo konu Lanzhou kaj Lan- zhou iru al la mondo, fariĝu komerca centro de la nova eŭrazia kontinenta ponto kaj reaperigu sian brilon sur la Silka Vojo.

Dum la 10 tagoj de la festivalo 10 000 komercistoj en- kaj eksterlandaj kolektiĝis en Lanzhou, kaj tie tre

Parto de la Lanzhou-a Petrolrafinejo






Jadaj tasoj kaj ŝtonaj skulptaĵoj

viglis ekspozicio de komercaĵoj, intertraktado pri komerco kaj ekonomia interŝanĝo. Laŭ statistiko, la totala vendovaloro montrita en la subskribitaj komercaj interkonsentoj atingis 8.7 miliardojn da juanoj. Tio estas senprecedenca.


Samtempe la registaro de la provinco praktikis serion da favoraj politikoj por bonigi la investan medion. Pasintjare la provinco sankciis investon de alilandaj komercistoj jam por preskaŭ cent entreprenoj kaj la totala investita monsumo estis pli ol miliardo da usonaj dolaroj. La nombro superis la totalan sumon en la 10 jaroj antaŭ 1992.


Sur la revenvojo de Dunhuang al Lanzhou mi vidis la inaŭguron de konstruado de la dutraka fervojo inter Lanzhou kaj Xinjiang. Tie flirtis koloraj flagoj, sonoris tamburado kaj bruis maŝinoj kaj aŭtoj. Ĉio ĉi jam englutis la sonoron de kamelaj sonoriloj sur la Silka Vojo... ■



Lanzhou en nokto

Paŝtado ĉe la piedo de la Granda Muro





Riça rikolto de cepoj



ZHENG ZHENJIE:

Salikoko- kulturado sur marbordo

BELA frua aŭtuno alvenis al Jinxian(-Ĝinŝjan)-gubernio ĉe la Golfo de Bohai-mar. Jam ruĝiĝis sorgo, flaviĝis rizo kaj ĉarmis floroj de kotonoj... Ĉio ĉi tio montris al la salikoko-kulturistoj, ke baldaŭ venos la tagoj por kapti salikokojn.

Ĉe la gubernio sterniĝas 94 kilometroj da marbordo, kuŝas 18 000 hektaroj da marborda etendaĵo kaj abundas naturaj nutraĵoj por fiŝoj kaj salikokoj. Iu maljuna fiŝisto diris al mi, ke antaŭ multaj jaroj, en la salikoko-kapta sezono, iuj fiŝistoj metis korbojn kun logaĵo en malprofundaĵon, post momento aro post aro da salikokoj ensaltis en ilin. Post malpli ol kvar horoj, granda sitelo jam pleniĝis de salikokoj.

Tamen, limigitaj estas la maraj riĉfontoj. En la lastaj jaroj, pro troa kaptado de salikokoj kaj polucio de la marakvo, rimarkinde malgrandiĝis la kvanto de la kaptitaj salikokoj ĉe la Golfo de Bohai-mar, tial la fiŝistoj komencis kulturi salikokojn. Ili ekspluatis "bluajn kampojn" kiel salikoko-kulturajn basenojn sur la dezerta marbordo kaj ekkulturis bonrasajn orientajn salikokojn.

Ĉe la marbordo proksime al la vilaĝo Hadabu de Jianye (Ĝjanje)-subdistrikto, mi vidis 27-jaran salikoko-kulturiston Guo Qingyu (Gŭo Ĉingju) malŝarĝi per nutraĵo ĉe salikoko-kultura baseno. En unu *mu*-o da marsurfaco (1 *mu*-o egalas al 1/15 hektaro) li sukcese rikoltis 500 kg. da sali-

Salikoko-kulturaj basenoj



Guo Qingyu

kokoj, kaj per tio li kreis azian rekordon. Laŭ mia peto li kun plezuro kondukis min sur boaton ĉe la baseno. Mi vidis, ke naĝas viandaj salikokoj en la klara baseno. Per unufoja retĵeto Guo Qingyu kaptis 7-8 kg. da salikokoj. Mezurinte iun salikon, mi trovis, ke ĝi longas 14 centimetrojn. Kun iom da bedaŭro Guo diris: "Pli frue vi venis ĉi tien, se vi venus post 20 tagoj, en la salikokokaptaj tagoj ĉe ni, vi vidus, ke ni kaptos pli ol 1 tunon da salikokoj per unufoja retĵeto."

"Ĉu vi povas facile forvendi tiom da salikokoj?"

"Unu parto estas rapide forvendebla, kaj la alia parto metiĝas en mia fridiga konservejo por enteni 50 tunojn. Tuj post kiam salikokoj estas kaptitaj, mi dungas laborulojn por senkapigi ilin kaj meti la korpojn en la fridigan konservejon, kaj pli poste, la prilaboritaj salikokoj estas aĉetitaj de la eksterakomerca departemento de nia provinco por eksporti al Japanio kaj aliaj landoj."

En sia nova domo Guo Qingyu diris al mi, ke pere de salikoko-kulturado riĉiĝis lia familio en la lastaj jaroj. Krom konstrui fridigan konservejon, li ankaŭ aĉetis du aŭtojn, unu boaton, unu traktoron kaj iujn porhejmajn elektrajn aparatojn. Lia fiksa kapitalo atingis 1.2 milionojn da juanoj. En 1991, dank' al salikoko-kulturado, lia familio enspezis 0.46 milionon da juanoj.

Sur la marbordo de Jinxian-gubernio, kvar subdistriktoj kaj unu ŝtata kultivejo konstruis pli ol 4 700 hektarojn da salikoko-kulturaj basenoj kun dreniloj kaj pumpiloj. Jam aperis la kompletigita sistemo de produktado de nutraĵo, kulturado, fridigado kaj prilaborado de salikokoj. La loko estas unu el la gravaj bazoj de norda Ĉinio por eksporti salikokojn kaj konkulojn. ■

Hao Liangbin kaj peonioj

de LI QIANG



Hao Liangbin en pentrado

EN la albumo de peonioj de Hao Liangbin kolektiĝas dekoj da ĉarmaj pentraĵoj pri peonio. Inter ili estas pentraĵoj ne nur delikatliniaj, sed ankaŭ liberstilaj. La elegantaj peonioj kun vivecaj folioj montras la grandan lertecon de la pentristo kaj lian adoron al la peonio.

En Ĉinio la peonio estas titolita “reĝo de floroj”. Fama poeto de Tang-dinastio (618-907 p.K.) admiris ĝin per la versoj “La peonio senkompare belas sur kampo. Dum florado granda vigleco regas tra l’ urbo.” La menciita urbo estas ĝuste la antikva urbo Luoyang, kies simbolo estas la peonio. Tamen el la vidpunkto de justeco, la urbo Heze de Shandong-provinco, la hejmloko de s-ro Hao Liangbin, estas des pli kvalifikita kiel lando de peonioj. En Heze oni kulturis peoniojn jam pli ol 400 jarojn. Prin-tempe, kiam la peonioj pompe floras en la ĝardenoj, venas tien rigardantoj unuj post aliaj kaj la floraromo tiklas la nazon. En maro da rigardantoj ne mankas personoj, kiuj sidas ĉe florbedo, atente rigardas kaj pentras peoniojn. Estante 8-jara Hao Liangbin komencis lerni pentradon. Li ofte kaŭris apud pentristo kaj senmove rigardis, kiel li skizas peoniojn, eĉ forgesante hejmenreveni. Poste, li mem prenis penikon kaj provis fari bildon. En la

komenco li kaŝis sin ĉe la angulo de florgardeno kaj kun hontemo pentris kaj pentradis, timante, ke oni mokos lin. Tiele, li kaj peonioj interligiĝis por eterne.

S-ro Hao Liangbin pentras kaj ankaŭ adoras la peoniojn. Li forgesas hejmenreveni, estante inter peonioj. Ili kondukis lin en la mondon de pentrarto. Li multe progresis en pentrado. Nelonge post kiam li, 13-jara, komencis lerni en mezlernejo, li estis invitita kiel belarta raportisto de “Dazhong Ribao”, provinca ĵurnalo de Shandong. Ekde tiam li dediĉis pli da tempo kaj energio al pentrado.

Poste, Hao Liangbin eniris la belartan fakultaton de normala lernejo. Li lernis fari delikatliniajn pentraĵojn de floroj kaj birdoj kaj samtempe bone studis pri ĉinstilaj pentraĵoj, akvareloj kaj olepentraĵoj, tial li metis solidan bazon por la teorio kaj tekniko de pentrarto. Dank’ al sia penado, la juna Hao Liangbin fariĝis talentulo tiurilate. Anstataŭ kateni sin per malnovaj rutinoj, li klopodas por krei novan stilon. Aparte menciindas, ke li bone scias asimili la fortajojn de la ĉin- kaj eŭropstilaj pentraĵoj, tiel ke liaj pentraĵoj, ĉu delikatliniaj ĉu liberstilaj, ĉiuj enhavas en si jenajn trajtojn: eleganteco, delikateco kaj riĉeco de esprimoj.

Inter la pentristoj de Ĉinio, multaj speciale faras bildojn de

peonioj. Iuj el ili atingis grandan sukceson aŭ fariĝis famuloj. Sed la peonioj pentritaj de Hao Liangbin distingiĝas tamen per aparta originaleco kaj sekve oni honoris lin per la titolo “reĝo de peonioj”. Liaj pentraĵoj estis publikigitaj en multaj ĵurnaloj kaj gazetoj kaj kolektitaj en albumoj. En Pekino, liaj pentraĵoj vidiĝas en la turo de Tian’anmen-pordego, la Popola Halo, la kunvenejo de la Ŝtata Konsilantaro kaj la Ŝtata Hotelo de Diaoyutai, kaj ankaŭ en Japanio, Usono, Kanado, Francio kaj aliaj landoj.

La premiita pentraĵo “Prin-tempe Saturas la Mondon” de la pentristo prenas peonion kaj pavon kiel la ĉefajn kaj magnolion kaj bambuon kiel la akcesorajn. Tia projekto multe plaĉas al li. La de li pentritaj peonioj donas efektojn kaj figuran kaj animan. “Kanto pri Paco” estas lia priferinda verko. Dank’ al liaj majstraj aranĝo kaj liberstila skizo de la bildo, buntaj peonioj konkuris pri sia beleco.

S-ro Hao Liangbin bone konas peoniojn, eĉ ĉiujn iliajn foliojn kaj stamenojn. Li studis pri la kresko de peonioj, atente observis ilin en vento, suno, pluvo kaj roso. Kun pli da amo, s-ro Hao Liangbin pentras peoniojn pli vivecaj. ■




"Floroj kaj Birdoj"

"En Printempo"





"Mandarenaj Anasoj"






"Kanto pri Paco"





La Ĉina Ĝardeno en Vaŝingtono



La vidindaĵo Ershisiqiao

ZHANG QINGZHEN:

Ĉina ĝardenistiko en la mondo

SE vi havos ŝancon viziti la aĉetcentron en Mississauga, Kanado, vi vidos elegantan "Ĉina Urbo". Ĝi konsistas el arkaĵo, naŭdraka ekranmuro, kiosko kaj pavilono, artefaritaj monteto kaj fontano. Arkitektoj lerte efektivigis la ĉinan klasikan ĝardenistikon en la moderna magazeno de Nord-Ameriko, kie aĉetado kaj turismo harmonie kombiniĝis. Ĝi estas ne nur praktika, sed ankaŭ beliga por la magazeno. En la supra etaĝo de la Domego de la Monda Teknika Centro de Vaŝingtono, Usono, vidiĝas 2 malgrandaj kortoj, nomataj "ĉina ĝardeno". Ili troviĝas endome, tamen en la konstruado oni aplikis la teknikon "preni rokon kiel monteton", kaj ricevis la artan efekton, ke en la ĝardeno ĉie vidiĝas montetoj, valoj kaj sovaĝaj plantoj.

Eble vi demandus: kiuj faris la elstaran verkon? Ĉu kanadanoj aŭ usonanoj? Mi senhezite respondas al vi: Ne. Ĝin konstruis la


Yangzhou(Jangĝou)-a Konstrua Kompanio de Klasikaj Ĉinstilaj Ĝardenoj. S-ro Chen Jinggui (Ĉen Ĝinggui), direktoro kaj supera inĝeniero de la kompanio, dediĉis grandan energion al la projektado kaj konstruado de la "ĉina urbo" kaj "ĉina ĝardeno".

La kompanio situas en la urbo Yangzhou, Jiangsu(Ĝjangsu)-provinco. Yangzhou estas antikva urbo kun multaj famaj ĝardenoj. Antaŭ nelonge mi intervjuis la respektatan ĝardenarkitekton Chen Jinggui. Kiam mi venis, li estis studenta kun siaj kolegoj desegnaĵon en la oficejo. Oni prave diris, ke li estas tre okupata. En lia tagordo ne troviĝas dimanĉoj nek ferioj. Forlasinte sian hejmon, li cerbumadis ekskluzive pri konstruo kaj desegnaĵo. Mi informiĝis, ke en 1968-1979 li starigis 10 fabrikojn, iuj el ili jam fariĝis fametaj entreprenoj kune investataj de Ĉinio kaj aliaj landoj. Li ne multe parolis pri tio, sed fervore konigis al mi la nomitan kompanion fonditan en

1980.

Direktoro Chen diris: "La ĉefa tasko de la kompanio estas rekonstrui kaj ripari famajn historiajn ĝardenojn en Yangzhou." La tasko ne estis malpeza. En Yangzhou jam dezertiĝis multaj ĝardenoj konstruitaj en la pasintaj jarcentoj pro historia ŝanĝiĝo kaj militaj tumultoj. Li kaj aliaj inĝenieroj kaj teknikistoj penadis en malfaciloj kaj sukcese rekonstruis la famajn ĝardenojn "Pianshi Shanfang" aranĝitan laŭ etoso de poemoj kaj projektitan laŭ pentraĵo kie staras strangaj montpintoj kaj kuŝas groteskaj rokoj, "Jingxiang(Ĝingŝjang)-legoĉambro", faman vidindaĵon Ershisiqiao en Shouxi-lago kaj "Juanshi Dongtian(Ĝjuanŝi Dongtjan)" en originala arkitekturo kaj en evidenta kontrasto de la pejzaĝoj. Multaj vidindejoj kaj antikvaj restaĵoj reakiris sian antaŭan aspekton.

La vidindaĵo Ershisiqiao konsistas el viadukto, arkponto kaj zigza-



S-ro Chen Jinggui (dekstre en la malantaŭa vico) en la Ĉina Urbo en Kanado

ga ponto, kiuj interligiĝas unu kun alia. La viadukto masonita el ŝtono aspektas firme kaj antikvece. La bela 24-ŝtupa arkponto, ĉirkaŭita de 24 jadaj balustroj, longas je 24 m. Ambaŭ finoj de la ponto prezentigas fantazie en luna nokto. Tamen en longa tempo ĝi restis nur nomo, fakte ne ekzistanta. En 1988 la Yangzhou-a Konstrua Kompanio de Klasikaj Ĉin-stilaj Ĝardenoj prenis sur sin la taskon ĝin projektiti kaj rekonstrui. Inĝenieroj kaj teknikistoj kun Chen Jinggui kiel la ĉefo faris la preparan laboron de projektado, kreado de montetoj kaj riveretoj, konstrua arto kaj farado de vidindejoj el plantoj. Dank' al du-jara zorgema konstruado la metiartistoj fine rekonstruis la ponton laŭ la originala aspekto.

Yangzhou situas norde de la malsupra baseno de Yangzi-rivero, tamen ĝia ĝardenistiko apartenas al tiu sude de la rivero. Antikvaj ĝardenarkitektoj, aplikante teorion pri ĉinstila pentrado en ĝardenistiko, kondensis la naturajn pejzaĝojn en malgrandan spacon kaj kunfandis ĝin kun la konstruaĵoj en unu harmonian tuton. Kaj tiel en limigita spaco ili kreis vastan kaj plezurigan ĝardenan pejzaĝon, kaj aperigis antaŭ turistoj tradiciajn ĉinajn pejzaĝojn, kie oni povas "rigardi, iri, vojaĝi kaj loĝi". Pro tio ĝardenoj en Yangzhou ĝuas grandan renomon en la ĉina ĝar-

dena sistemo.

Post la fondiĝo de la kompanio, multaj lokoj kaj departementoj en la lando invitis projektistojn kaj specialajn metiistojn de la kompanio ripari la detruitajn ĝardenojn, antikvajn konstruaĵojn kaj historiajn vidindejojn. Ĝi riparitis pli ol cent konstruaĵojn, kion oni alte taksis. Krome, la kompanio aplikis la formojn de la ĉina antikva konstruo en la konstruado de amuzejo, magazeno kaj restoracio, kombinante la klasikan belecon kaj la modernajn trajtojn en unu tuton. Tio estis bonvena al la publiko.

La zorgema projektado, supera teknologio kaj bona servo de la kompanio estas alte taksataj de la eksterlandaj klientoj. S-ro Chen diris, ke en 1985 la kompanio entreprenis la konstruadon de la korteto por la Japana Tsuba Internacia Foiro; en 1987 ĝi laŭkontrakte konstruis la "vilaĝo de ĉina kulturo" en Nara, Japanio. La du ĝardenoj en Kanado kaj Usono, menciitaj en la komenco de mia artikolo, estis konstruitaj en 1989. Ili ĉiuj estas laŭdataj de diversrondaj personoj en tiuj landoj. La ĵurnalo Nara Nichinichi Shimbun, Japanio, laŭdas, ke la "vilaĝo de ĉina kulturo" estas "admirinda metiartaĵo, la unua sub la ĉielo". Post finkonstruo de la "ĉina urbo" en Mississauga, Kanada Televido kaj diversaj ĵurnaloj de la loko detale raportis ĝin en longaj artikoloj kaj

bildoj, laŭdante, ke ĝi montras kaj la luksecon de imperiestra ĝardeno kaj elegantecon de ĝardenoj sude de Yangzi-rivero.

Novembre de 1990 5 germanaj ĝardenarkitektoj venis al Pekino, Hangzhou, Nankino, Suzhou, Wuxi (Uŝji) kaj Yangzhou por esplorado. Ili plej interesiĝis pri la vidindejo "Juanshi Dongtian", kie bonorde ornamigis kioskoj kaj pavilonoj kun la montetoj kaj lago kiel la ĉefaj. La projekto de la simpla kaj antikveca "Qingxiang(-Ĉingsĵang)-ĝardeno" estis aprobata de ili. Oni decidis, ke la kompanio respondecu pri ĝiaj projektado kaj konstruado. Finkonstruiĝinte, ĝi vidiĝos en la Internacia Ĝardena Foiro okazonta en Stutgarto, Germanio, en 1993.

En la 12 jaroj post sia fondiĝo la kompanio akumulis riĉajn spertojn en ĝardenkonstruado, kulturis kaj trejnitis altnivelan arkitektan trupon de klasikaj ĝardenoj kaj posedas superajn fakulojn, projektistojn kaj lertajn teknikistojn pri tradicia metiartaĵo enlande. Ĝi akiris orajn medalojn de la ŝtata kaj provinca elstara projekto kaj altkvalita konstruo. Chen Jinggui ja estas ilia elstara reprezentanto. Li diris al mi, ke ili volas dediĉi sian tutan energion al konstruo de Yangzhou-stilaj ĝardenoj por ke pli da personoj ĝuu la ĉinan ĝardenistikon. ■

Tianjin vidata de sur la televizia turo

Teksto kaj fotoj de LI CHUNGENG


La radio-televizia turo en sudokcidenta Tianjin altas 415.2 metrojn, la tria en la mondo kaj la unua en Azio. La turo estis konstruita en oktobro 1991. Krom dissendi televidajn programerojn en sep kanaloj kaj radiajn programerojn en naŭ kanaloj de frekvenca modulado, la turo servas ankaŭ al meteoprognozo, mediprotektado, trafiko, fajroestingo, telekomuniko k.a. Cetere, la turo estas vizitinda loko.

Mi kreskis apud Haihe-rivero en la urbo. La lastan someron mi vizitis mian hejmurbon kaj ankaŭ la turon. Mi venis al la belvidejo 270 metrojn super la tero kaj havis belan panoraman vidon de la urbo. Tute ŝanĝiĝis mia impresoj pri la urbo. Novaj altaj domoj anstataŭis la kadukajn senordajn dometojn, la stratoj estis multe larĝigitaj kaj noditaj per trefokruciĝoj. La nova stacidomo, plej granda en Azio, pura Haihe-rivero, belaj promenejoj, larĝaj aleoj faris mian hejmurbon pli ĉarma.


La televizia turo en nokto



Parto de Tianjin



La hotelo Kristala Palaco



En la belvidejo sur la turo



Pri la maŭzoleo de Qin-dinastio kaj argilaj militistoj kaj ĉevaloj

de LIANG YE

LA plej grandioza kaj plej fama el la maŭzoleoj de la ĉinaj imperiestroj, nun ekzistantaj, estas tiu de la Unua Imperiestro de Qin (Ĉin)-dinastio (221-206 a.K.). Ĝi famas ne nur pro tio, ke la tombomastro havis grandan renomon, sed ankaŭ pro la fakto, ke oni elterigis ĉe la maŭzoleo pli ol mil argilajn militistojn kaj ĉevalojn altastaturajn kaj versimilajn. Rigardinte la historiajn objektojn, iu gvidanto de alilanda registaro admiris, ke ili povas esti nomataj la oka miraklo de la mondo. Decembre de 1987, Unesko enlistigis ilin kiel heredaĵon de la monda kulturo.

PRI MERITOJ KAJ KULPOJ DE LA UNUA IMPERIESTRO

La Unua Imperiestro de Qin-dinastio estis eminentulo. Lia nomo estis Ying Zheng kaj reĝiĝis en Qin-regno en la aĝo de 13 jaroj. Lia surtroniĝo okazis ĝuste en la lasta tempo de la periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.), kiam senĉese batalis unu kontraŭ alia por hegemonio la sep regnoj Qin, Qi (Ĉji), Chu, Yan, Han, Zhao kaj Wei. En la aĝo de 21 jaroj li ekfariis militon por unuigi Ĉinion. En la daŭro de 10 jaroj li pereigis ĉiujn aliajn regnojn kaj en 221 a.K. li fondis la unuan unuigitan centralizisman feŭdisman landon en la ĉina historio kaj titolis sin la Unua Imperiestro de Qin-dinastio. Tial li fariĝis la unua imperiestro en la ĉina historio.

Liaj ĉefaj meritoj estas, ke li finis la kaosan situacion, kiu daŭris pli ol 500 jarojn, fondis unuigitan feŭdisman landon, abolis la vasalan sistemon, dividis la landon en 36 provincojn kaj mem nomumis ĉiujn lokajn ŝtatoficistojn; li eliminis la kaosan leĝaron, unuigis la mon-kaj mezur-sistemojn kaj reformis ĉinajn ideogramojn. Ĉio ĉi tio akcelis la disvolviĝon de ekonomio kaj kulturo de la socio.

Dum sia regado li arbitre rekviziciis milionon da laboruloj por konstrui la Grandan Muron, palacon Epang kaj maŭzoleon. La peza laboro multe suferigis la polanojn. Por sia regado li praktikis severajn leĝojn kaj ordonis detruiri armilojn uzatajn de la ordinaraj popoloj, forbruligi ĉiujn historiajn librojn escepte tiujn de Qin-regno, klasikajn konfuceanisman verkojn kaj enterigi 460 intelektulojn kiuj kritikis lin, en Xianyang (Ŝjanjang), la ĉefurbo de Qin-dinastio.

Fakte Qin-dinastio ekzistis nur dekelkajn jarojn. Kial ĝi pereis tiel rapide? Unu el la ĉefaj kaŭzoj kuŝas en tio, ke la kortego de Qin-dinastio praktikis kruelajn politikojn.

LA GRANDIOZA MAŬZOLEO DE LA UNUA IMPERIESTRO

La nomita maŭzoleo kuŝas 5 km oriente de la gubernio Lintong, Shaanxi (Ŝenŝji)-provinco. Ĝi konsistas el la interna kaj ekstera partoj en oblongo. La interna longas 1 355 m de norde suden

kaj larĝas 580 m de okcidente orienten, kun perimetro de 3 870 m. La ekstera longas 2 165 m de norde suden kaj larĝas 940 m de okcidente orienten, kun perimetro de 6 210 m. En dokumento legiĝas, ke la origina tombo estis alta 115 m, sed nun ĝi havas alton de 76 m, kun perimetro de 1 390 m. Multaj surteraj konstruoj de la maŭzoleo jam antaŭ longe malaperis.

En 1974 estis malkovritaj tri kavoj (n-roj 1, 2, 3) de argilaj militistoj kaj ĉevaloj, kun areo de 20 000 kvadrataj metroj, 1.5 km oriente de la maŭzoleo. Laŭ kalkulo far fakuloj, por konstrui la kavojn oni fosis 100 000 kubmetrojn da tero, uzis 8 000 kubmetrojn da ligno kaj sternis 250 000 brikojn sur la planko. En la lastaj jaroj ĉirkaŭ la maŭzoleo estis malkovritaj ankaŭ multaj ruinoj de konstruaĵoj kaj kavoj. Vere miriga estas la skalo de la maŭzoleo!


GRANDA GWARDIO DE LA MAŬZOLEO

La malkovro de argilaj militistoj kaj ĉevaloj en la maŭzoleo estas rigardata kiel granda miraklo de la ĉina arkeologio. Ĝis nun, estas elterigitaj 1 400 argilaj militistoj, 20 militĉaroj, 100 argilaj ĉevaloj kaj ĉ. 10 000 bronza armiloj. Fakuloj antaŭkalkulis, ke la tri kavoj entenas sume 7 000 argilajn militistojn, 130 militĉarojn kaj 600 argilajn ĉevalojn.

La argilaj militistoj kaj ĉevaloj estas same altaj, kiel veraj homoj kaj ĉevaloj. La argilaj militistoj



Argilaj militistoj kaj ĉevaloj en la kavo n-ro 1



Bronzaj ĉaro kaj ĉevaloj elterigitaj en la maŭzoleo

altas ĝenerale 1.7-1.85 m kaj argilaj ĉevaloj longas 1.9-2.17 m. Argilaj generaloj kaj ordinaraj oficiroj estas nur malmultaj, dum infanterianoj, kavalerianoj kaj ĉaristoj konsistigas grandan parton de la legio. Iuj portas kirason kaj militrobon, aliaj portas ĉapon aŭ harplektaĵon sur la kapo. Tamen ili ĉiuj tenas armilon en mano. La malsamrangaj militistoj tenas armilojn kun malsamaj longoj, kiaj spado, lanco, halebardo, spontono kaj pafarko. Inter armiloj la plej multnombra estas bronza sagpinto.

La argilaj militistoj kaj ĉevaloj estas bonorde vicigitaj laŭ formacio de Qin-dinastio. La plej granda estas kavo n-ro 1. Ĝi estas oblonga, en kiu militĉaroj kaj infanterianoj estas vicigitaj alterne. La avano de la formacio konsistas el tri linioj, ĉiu el 68 militistoj kun pafarko en la mano. Plejparto de ili estas leĝeraj infanterianoj. Malantaŭ ili estas 38 kolonoj el militĉaroj kaj infanterianoj. Tio estas la ĉefa parto de la formacio. Ambaŭflanke kaj malantaŭe de ĝi estas defendantaj trupoj. En la kavo n-ro 2 estas zigzaga formacio el kvar partoj, kies antaŭan parton defendas 334 arkpafistoj. Ekstere de la formacio 174 militistoj faras pafadon kaj interne de ĝi 160 militistoj prenas pozon kaŭrantan aŭ genuantan. En la nordokcidenta angulo de la formacio vidiĝas ĝeneralo el tiranta glavon kaj unu mezranga oficiro. En la dekstra flanko de la formacio lokiĝas ok vicoj da militĉaroj. Ĉiu vico kon-

sistas el 8 ĉaroj. Sur ĉiu ĉaro estas tri militistoj. Meze de la formacio staras 19 militĉaroj, 204 infanterianoj kaj 8 kavalerianoj, aranĝitaj en tri kolonoj, kiuj ĉiuj formas formacion en miksa aranĝo. Ĉe la maldekstra flanko de la formacio staras 6 militĉaroj kaj 108 kavalerianoj. En la kavo n-ro 3, sidejo de la komandejo, estas unu militĉaro kaj 64 argilaj gvardianoj.

Kial oni garnizonigis tiel grandan "armeon" oriente de la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio? Ĉar en la okuloj de la tiamaj regantoj la maŭzoleo kvazaŭ palaco en la ĉefurbo Xianyang kaj la argilaj militistoj kaj ĉevaloj — gvardianoj de la palaco, estas taskitaj por defendi la restaĵon de la mortinto. Aliflanke, Qin-dinastio timis, ke la pereintaj ses regnoj en la oriento restaŭriĝos kaj denove atakos ĝin. Jen kial oni faris la aranĝon!

Pro tio, ke ĝis nun oni ankoraŭ ne faris prifosadon de la internaĵo de la maŭzoleo, oni ne scias detale, kia ĝi estas. Tamen historiaj dokumentoj diras, ke interne de la maŭzoleo troviĝas abundo da juveloj, hidrargaj riveroj kaj lagoj, kaj dugonga graso uzata kiel lampoleo. Laŭ la moro "servi al la mortinto kiel al la vivanto" oni enterigis ĉion uzatan de la homo kaj tiamaniere konstruis la novan "subteran reĝlandon".

LUKSAJ BRONZAJ ĈAROJ KAJ ĈEVALOJ

Decembre de 1980, estis elterigitaj du bronzaĵoj tirataj de bronzaĵoj ĉevaloj, kun kolora de-

segno, en la loko je 20 m okcidente de la termaso de la maŭzoleo. La ĉaroj kaj ĉevaloj estis terure detruitaj ĉe la elterigo. Por havi ilian originan aspekton koncernaj fakuloj laboris kelkajn jarojn. La strukturo de la ĉaroj estas komplika kaj la desegno tre bela. Ili estas grandaj je 1/2 de la veraj. La ĉaro n-ro 1 portas ombrel-forman bronzan kovrilon kaj en ĝi staras bronzaĵoj homfiguroj. La ĉaro n-ro 2 havas tegmenton volvan kaj sidlokojn, sur kiuj sidas bronzaĵoj oficistoj. Ĝi estas luksa ĉaro por la animo de la Unua Imperiestro.

La ĉaro n-ro 2 konsistas el 3 462 oraj, arĝentaj kaj bronzaĵoj elementoj kaj pezas 1 241 kg. (inkluzive de 3 033 g. da oro kaj 4 342.1 g da arĝento). La elementoj estas malsamgrandaj kaj diversformaj. La plej longa el ili longas 246 cm. kaj la plej mallonga — malpli ol unu cm. La plej granda el ili havas grandecon de 2.3 kvadrataj metroj kaj la plej malgranda de malpli ol unu kvadrata centimetro. Kompreneble, estas tre malfacile nomi ĉiujn elementojn, por ne paroli pri rehavo de ĝia origina aspekto. Tamen, la arkeologoj sukcesis realigi sian celon post granda penado.

En 1979 la kavoj estis oficiale eksponataj. Ĝis nun dekoj da milionoj da ĉinaj kaj alilandaj turistoj vizitis ilin. Iam la nombro de vizitantoj superis 10 000 en unu tago. Ĉiuj vizitantoj senescepte admiris la belajn historiajn restaĵojn. ■



Malfeliĉo trafis la bonzojn.



En simia regno

BRIKSKULPTAĴOJ EN ĈINIO


Teksto de ZHANG YIBING

Fotoj de LING YOUJUAN

Drako-palaco

Brikskulpturo estas antikva popola arto de Ĉinio. La skulptaĵoj el brikoj estas uzataj por beligi konstruaĵojn. Nun en Ĉinio vidiĝas multaj antikvaj brikaĵaj skulptaĵoj.

En ĉi numero mi konigos al vi novan brikan skulptaĵon pri la ĉina mita romano "Pilgrimado al la Okcidento". La verko, 100 m longa kaj 2 m larĝa, estas farita de du kamparanoj el Jiesshou (Ĝješou), Anhui-provinco. La kreaĵo lokiĝas en la turisma loko Huanghe, Zhengzhou (Ĝengĝou), Henan-provinco. La skulptaĵo rakontas, kiajn malfacilaĵojn venkas Xuanzang, eminenta bonzo de Tang-dinastio (618-907), kaj liaj tri disĉiploj sur la vojo al la Okcidento (la budholando) por religia afero, kaj kiel ili batalas kontraŭ ferocaj demonoj kaj spiritoj. Kiel reliefa bildrakonto, ĝi profunde impresas per sia viveco.



Indiĝenoj kaj iliaj infanoj

(Novelo)

CHU Xiaomei (Ĉu Ŝjaŭmei) fermis sin en sia ĉambro kaj aŭskultis de kapaŭdilo muzikon de saksofono kaj klarneto. Ŝia avo estis skoldanta sin. Xiaomei sin izolis de la skoldado per muziko. For de la oreloj, for de la koro. Xiaomei estis tre kontenta pri sia defensivo.

“La knabinaĉo meritas la insulton de la avo. En malpli ol unu jaro ŝi jam ŝanĝis dufoje servejon. Ĉu ĉiam kulpis la fabrikojn? Se jes, kial la aliaj povas daŭre labori tie? Kiam mi estis juna, ĉian lacigan kaj malpuran laboron mi volonte faris,” plendis la patro.

“Vi ne diru pri tiuj jaroj! Kiaj estis tiuj jaroj? Kiaj estas ĉi tiuj jaroj? Nun nia loko estas ekspluata regiono, kaj funkcias multaj fabrikoj. Kial la aliaj povas havi bonan profesion, sed nia Xiaomei devas ĉiam nur kudradi? Ĉu nia infano ne havas la rajton labori en pli bona fabriko?” malprobe diris la patrino.

Sed Xiaomei ne aŭdis la pravigon favoran al ŝi.

Malgraŭ sia pravigado, la patrino jetis rigardon al la filino kaj profunde vespiris. Ankaŭ la patro suspiris profunde.

Informiĝinte pri varbo de laboristoj en la ekspluata regiono, la tri generacioj de la familio Chu dronis en granda ĝojo. Sed samtempe la familio sentis ian maltrankvilon, ke la investantoj estas fremdlandanoj. Kiel oni faros la varbadon? Por la tieaj indiĝenoj fariĝi salajrata laboristo estis revo malfacile realigebla.

Xiaomei iris al sia kunlernantino Erya (Erja), filino de la vilaĝestro. En ŝia hejmo oni ofte aŭdis novaĵojn.

Forlasinte la loĝejon de la vilaĝestro, Xiaomei ĝoje iris kune kun Erya orienten al la provizoraj loĝejoj.

Tie kolektiĝis multe da homoj legantaj varboafiŝon. La anonco sur la papero estis tute sama kiel la informo de Erya: Xingfa-kompanio de Mangoservico, entrepreno kune investita de Ĉinio kaj Hongkongo, bezonas gejunulojn de malpli ol 25 jaroj, kun mezgrada edukiteco. Ekzameno estis necesa. La produktaĵo — mangbastonetoj — eksportiĝos en Japanion kaj Hongkongon.

“Ha, kiel interese, ke niaj mangbastonetoj povos eksportiĝi!” Xiaomei diris al Erya.

Xiaomei fermis sin en sia ĉambro kvin tagojn por ripeti la kursojn de politiko, ĉina lingvo kaj matematiko. Ŝi legadis, parkeris, faris diversajn ekzercojn, kiuj, laŭ ŝia konjekto, probable aperos en la ekzameno. Ŝi komplete laciĝis de la ripetado.

Feliĉe ŝi sukcesis en la ekzameno. La anonco de la nomlisto de sukcesintoj tiom ekscitis la lokon, ke la gaja babilado de virinoj daŭris duontagon ĉe la provizora loĝejo.

“Ĉu via Xiaomei sukcesis?”

“Jes, ŝi estis unu el la plej unuaj sukcesintoj. Kiel via Zhizi?”

“Ankaŭ ŝi sukcesis.”

“Fine realiĝis ilia deziro.”

Ofico en la fabriko faris la gejunulojn kontentegaj. Blanka ĉapo, blanka kitelo, blankaj gantoj kaj

blankaj ŝuoj faris ilian iradon parada. Antaŭe, ĝi estis mistera por ili. Sed post kelke da tagoj ili trovis, ke la produktado de eksportaĵoj estas tre simpla kaj enuiga. Kun agaca tondra muĝado la elektraĵoj segiloj tranĉadis la trunkojn elportitajn el Heilongjiang-provinco, aliaj maŝinoj latigis la ŝtipojn, poste oni splitis la latojn en stangetojn, vaporumis ilin, sekigis kaj fine enpakis ilin. Xiaomei laboris super elektado kaj en malpli ol du tagoj sangaj vezikoj elstaris sur ŝiaj delikataj fingroj. Tion suferis ankaŭ Erya. Ili senpacience laboris kelke da semajnoj, sed ŝajnis al ili, ke pasis jam pluraj monatoj.

Post vespermanĝo Xiaomei iris al Erya.

“Kio interesa estas tia laboro? Nur iomete pli facila ol kamplaboro.”

“Eĉ kamplaboro estas pli interesa, ke ni povas havi belan panoraman vidon kaj freŝan aeron. Sed en tiu ĉi fabriko ni estas tute katenitaj de la maŝinoj kaj la nazon pikas fiodoro de popla ligno.”

“Ĉu tia laboraĉo bezonas edukitecon de alta mezlernejo?”

“Sed kion fari? Ĉu ekŝiĝi?”

“Ekŝiĝi? Kion ni faros poste?”

“Mia patro diris, ke post nelonge vestofabriko varbos laboristojn.”

“Ĉu laboro en la vestofabriko estas pli bona?”

“Ne malbona estas la profesio de tajloro.”

Dirite, farite. La du knabinoj kategorie forlasis la fabrikon, forlasis

la oficon malfacile akiritan.

La patrino de Xiaomei koleris dum pluraj tagoj, kaj la avo senĉese skoldis la knabinon, ke ŝi ricevos punon pro sia arbitreco.

Xiaomei konsolis siajn avon kaj patrinojn: "Vi ne koleru plu, mi petas. Kia intereso estas la laboro kolektadi bastonetojn kiel roboto? Mi laboros en vestofabrika."

"Ĉu la vestofabrika obeas vin?"

"Mi ne estas genio, sed mi estas certa, ke mi sukcesos en ekzameno. Mi preskaŭ sukcesis en ekzameno por eniri en superan lernejon. Kaj cetere, mi faros por vi vestojn kiam mi ellernos la metion."

Silentiĝis la gepatroj opiniante, ke bona estas la tajlorado, ĉar la socio neniam povas malhavi tajloradon kaj kuiradon. Sed ili ne vidigis sian kompromison. "Varbado ne estas simpla afero, certe multaj homoj konkuros,"

timis la gepatroj.

Post nelonge la vestofabrika komencis varbi laboristojn. Xiaomei facile trapasis la ekzamenon. Sukcesis ankaŭ Erya, sed ne tiel glate kiel Xiaomei. Laborante en la fabrika, ili trovis, ke ĉio estas ekster ilia atendo. La tajlorado, kudrado, orlado, gladigado... la divido de laboro estis tiel preciza, ke Xiaomei eĉ ne povas vidi la aliajn laborĉenerojn. Kiel do ŝi povis lerni tajloradon?

Xiaomei laboris kiel transportanto por laborĉeno. Post nur kelke da tagoj ŝi tute enuigis de la monotona transportado kaj la intenco de ekŝigo denove tiklis ŝin. Sed ŝi hezitis skrupulante, ke la avo kaj la gepatroj denove skoldos ŝin.

Laborinte malpli ol unu monaton en la vestofabrika, Erya havigis al si novan laboron en japana elektronika kompanio helpate de konato de la patro, ĉar ŝi aŭdis, ke la kompanio

sendos novicojn trejniĝi en Japanio. La novaĵo tiel enviigis Xiaomei, ke ŝi streĉis la orelojn por informiĝi pri nova varbo.

Ŝi nevole laboris plu kelkajn tagojn kaj fine ekŝigis malgraŭ malaprobo de la gepatroj kaj admono de amikoj.

Ege maltrankviliĝis la patrino. Fakte kelkaj fabrikoj estis varbantaj laboristojn, sed la patrino maltrankviliĝis pro la onidiro, ke la Laboradon Buroo malpermesas al la memekŝigintoj havi novan laboron en unu jaro post ekŝigo. Se tio estas vera, Xiaomei certe malsaniĝos de ĉagreniĝo. Sed oni ne devas kulpigi la Laboradon Buroon. La tieaj gejunuloj tro ventkape ŝanĝadis la laboron. Ricevinte fingron, ili la tutan brakon englutos. Senĉese aperis novaj fabrikoj, kaj la gejunuloj kvazaŭ forĵetis ne oficon, sed nur cigaredstumpojn aŭ fruktokernojn.

Plejparto de la laboristoj de la fabrika de mangbastonetoj forlasis la fabrikon. Kaj ili elokvente motivis sian ŝanĝon, ke ili havas la liberecon en elekto de laboro.

Tro enuiga estis la atendo. Xiaomei ĉagreniĝis vidante siajn kamaradojn fluge biciklantajn al laboro.


Oni dufoje sciigis al Xiaomei, ke la laborejestro de la vestofabrika povas reakcepti Xiaomei malgraŭ ŝia memekŝigo. Tia favoro validis nur por Xiaomei, kaj la aliaj ekŝigintoj neniel povis reveni en la fabrikon. La laborejestro trovis, ke Xiaomei estas pli saĝa ol la aliaj kaj certe fariĝos bona laboristino post trejnado.

Xiaomei bone sciis, ke la laborejestro estas tre favora al ŝi, kaj ŝi gajnos ĉiumonate 300 juanojn post trimonata provado. Sed ŝi ne volis retiriĝi en sia decido.

Erya flugis eksterlanden. Tio multe ekscitis Xiaomei.

Xiaomei pli kaj pli firmiĝis en sia celo. Ŝi partoprenis nur en la ekzamenoj de la fabrikoj, kiuj sendos eksterlanden trejniĝi. Ŝi deziregis iri eksterlanden por ion ellerni, kaj poste fari decidojn por sia profesio.

Finfine venis la ŝanco. Iu japana pelta kompanio komencis varbi laborulojn. La afiŝo anoncis, ke antaŭ ekzameno estos vidalvida interparolito.



“Oni volas havi laboristojn por peltaĵoj, sed ne kelnerinojn en hotelo, por kio do vidalvide?” miris la patro.

“Tio estas rigardekzameno,” diris la patrino.

Kaj Xiaomei diris: “Verŝajne ili volas scii, ĉu la aspekto de la ekzamenatoj estas plaĉa, ĉu ili estas viglaj. Eble la elektitoj povos partopreni en la ekzameno, ĉar tro multe da homoj sin anoncis por ĝi.” Sed fakte ankaŭ Xiaomei estis en nebulo. Kia estos la vidalvida interparoleto?

La sekvantan antaŭtagmezon la ekzamenatoj kolektiĝis en la nedekorita kunvenejo de la pelta kompanio, kie la nazon pikis laodoro de kalko kaj cemento. Venis la vico al Xiaomei kaj aliaj tri knabinoj. La kvaropo sin movis antaŭ japanon kun broŝhararo. Konsternite de timideco, Xiaomei ne sciis, kiel ŝi faris la paŝojn.

Rimarkinte ŝian streĉitecon, la japana ekzamenanto ne povis sin deteni de rido. Kaj lia rido pli konsternis Xiaomei. Ŝi klinis la kapon, zorgeme pririgardis sin, timante, ĉu maldecis la vestado. Ŝi nerveze ŝvitis

pro konsterniĝo.

Ŝi nur memoris, ke la japano diris kelke da vortoj, la interpretisto faris kelkajn demandojn kaj ŝi malaplombe respondis kaj etendis la manojn al la japano por lia ekzameno.

“Malsukceso, kompleta malsukceso,” ŝi tiel pensis. Sed ekster ŝia atendo, ŝia nomo aperis en la nomlisto de sukcesintoj, kiuj povas partopreni en la duafoja ekzameno.

Komenciĝis la duafoja ekzameno. Oni disdonis al la ekzamenatoj po tondilon, boteleton da gluo kaj paperpecon. La ekzamenatoj devis fari el papero vestojn kaj pantalonon en 40 minutoj.

Xiaomei estis lerta en tio. Ŝi lernis de ia avino de Erya tranĉadon de fenestra paperfloro. Ŝi fariĝis memfida pri la ekzameno.

Eniris la japano. Li iris al Xiaomei kaj rigardis ŝian paperan jakon. Xiaomei levis la kapon kaj renkontis lian kontentan rigardon.

Xiaomei tiel facile trapasis la ekzamenon. Ŝia nomo aperis en la unua loko de la nomlisto de la sukcesintoj, kiuj iros trejniĝi en Japanio. Tenante la ruĝan informilon Xiaomei saltis

de ĝojo.

“Mia filino estas feliĉa,” ĝoje diris la patrino.

Aviadilo muĝante forlasis la flughavenon de la urbo. Xiaomei sidis en la kajuto. Kiam foriris stevardino, Xiaomei ŝtele malligis la sekurrimon. Malgraŭ doloreto de la oreloj pro leviĝo de la aviadilo, ŝi rigardis malsupren tra la fenestro. Ho, kiel malgranda estas la duoninsulo, kie ŝi loĝis! Sed antaŭ la duoninsulo la maro estas senlima.

Xiaomei firme kroĉiĝis al la fenestro, kio malkontentigis la kamaradon. “Xiaomei, for de la fenestro, ankaŭ ni rigardu.”

La kajuto estis plena de gajeco. Tiuj sesdek junuloj unuafoje veturis eksterlanden. Ili ekscitiĝis, ke ili estos en tute fremda lando. Xiaomei refoje rigardis eksteren: la aviadilo estas fluganta super nubaro, kaj pli supre estas senlima ĉielvolbo.

Tute nova vivo atendas la gefilojn de la indigenoj. ■

LI YUAN:

Nova tumor-lokalizilo

NUN la morbokvanto de kanceraj fariĝas pli kaj pli granda. Tumoroj okazas nerimarkite. Oni trovas ilin preskaŭ ĉiam en ilia malfrua stadio, tial oni perdas la konvenan tempon por ilin kuraci. Pro tio pli fruaj malkovro, diagnozo kaj kuraco fariĝis ŝlosila problemo solvenda de la monda medicinistaro. Kombinante la tradician ĉinan medicinon kun la

moderna elektroniko, ĉinaj medicinistoj faris esploradon en pli ol 20 jaroj kaj inventis komputilan tumor-lokalizilon DY. La klinika praktikado en multaj jaroj montris ĝian benefikon.

Farinte longtempan esploron, la inventisto de la aparato opinias, ke en la kancera evoluo la homa korpo donas biologian kaj fizikan informojn, kiuj iras laŭ la *ĝing-luo*-vojoj, tial oni po-

vas ekzameni la specialajn *ĉjŝjue*-punktojn per aparte fariataj elektronaj sondiloj, enmetas la akiritajn informojn en la komputilon kaj transformas ilin en koeficientojn. Farante analizadon surbaze de tiuj informoj kaj la simptomoj, en 7-8 minutoj la aparato konigas, ĉu en la homa korpo estas tumoroj aŭ ne, ĉu la tumoroj estas benignaj aŭ malignaj. La Pekina Xiehe-hospitalo, Shenyang-a Tumora Hospitalo

kaj aliaj 8 grandaj hospitaloj de Ĉinio per tiu aparato ekzamenis 1 200 pacientojn suferantaj de diversaj tumoroj. La rezulto montris, ke 90% de la donitaĵoj estas ĝustaj. Fakuloj opinias post ekspertizo, ke tiu aparato estas scienca, avangarda kaj aplikebla. Ĝi estas nova inventaĵo por tumor-diagnozo.

Ja estas multaj ekzemploj tiukampe. Oni ekzamenis iun 32-jaran laboriston kaj trovis, ke sur lia supra maldekstra pulmo estas ombro. Kuracisto diagnozis, ke li suferas de tuberkulozo. Poste oni ekzamenis lin per la tumor-lokalizilo DY, kiu montris malignan informon. La laboristo konsultis kuraciston de tumora hospitalo. Post kolektiva diagnozo oni konstatis, ke li suferas de pulma kancero. Dank' al la ĝustatempa kuracado lia vivo estis savita. Estis ankaŭ iu maljunulino. Oni faris korpan ekzamenon, sed ne trovis tumoron. Ŝi estis allogita de la famo de tumor-lokalizilo DY kaj venis por esti ekzamenata. La aparato montris malignan informon, sed ŝi ne kredis. Post 6 monatoj ŝi sentis sin nebone en la subventro. Tiam hospitalo diagnozis, ke ŝi havas ovaritumoron. La patologia raporto post operacio diris, ke ŝi estas atakata de ovariglanda kancero. Tio atestis, ke antaŭ formiĝo

de la tumor, la aparato konas koncernajn informojn.


Estas ankaŭ kontraŭaj ekzemploj. En Shandong-provinco estis iu 50-jara virino. La Popola Hospitalo de Shandong-provinco faris al ŝi ultrasonajn ekzamenojn B kaj CT kaj diagnozis, ke ŝi suferas de maligna tumor de surrenaj glandoj, sed la tumor-lokalizilo DY donis benignan informon. Ŝi estis operaciita kaj la operacio montris, ke ŝi suferas de absceso de surrenaj glandoj. En la urbo Dandong, Liaoning-provinco, estis iu 61-jara viro, kiu havis ombbron grandan kiel kolomba ovo sur la malsupra dekstra pulmo. Kuracisto diagnozis, ke tio estas pulma kancero. En Pekino oni faris al li ekzamenon per tumor-lokalizilo DY kaj ricevis benignan informon. Li vizitis fine la Pekinan Tumoran Hospitalon kaj tiu donis al li neŝanceblan diagnozon: pneŭmonio, tiel ke la paciento liberiĝis el granda maltrankvilo.

Kiel nova metodo por esplori tumorojn, la komputila tumor-lokalizilo DY havas jenajn funkciojn: a. Fari ĝeneralan kribradon por trovi kancerulojn kaj liveri fruajn informojn por preventi kaj kuraci tumorojn. b. Determini la kvaliton de la tumoroj. Ĝi multe helpas la iks-radiojn, ultrasonojn CT kaj B, nukle-magnetan reson-

ancon en la diagnozo kaj multe pliigas la ĝustecon de la klinika diagnozo, kombinante la determinon de tumora lokalizo kun tiu de ĝia kvalito. c. Observi la operacian efikon al la kanceruloj kaj la novan tendencon de la kancera recidivo kaj ĝia translokiĝo. ĉ. Observi la kuracan efikon de la konservativa terapio de kanceroj. d. Uziĝi en la scienc-esplorado, kuraco kaj prevento de la tumoroj. Per la tumor-lokalizilo DY oni povas trovi tumoron en ĝia frua stadio kaj en la ekzameno ĝi ne kaŭzas vundon, doloron nek aliajn malutilajn rezultojn kaj plie, ĝia manipulado estas facila. Pro ĉio ĉi tio ĝi estas tre ŝatata. Oni prave diris, ke per tiu aparato malsanuloj povas trovi sian malsanon kaj sanuloj estas trankvilaj post la ekzameno.

La komputila tumor-lokalizilo DY estas nova scienc-teknika aparato, kaj ĝi estas multe ŝatata pro siaj eminentaj funkcioj. En 1990 ĝi ricevis la premion "eminenta produkto" de la Unua Pekina Scienc-teknika Konkurso "Lumoj" kaj estis prijuĝita kiel nova ŝtata produkto. En junio de 1991 ĝi ricevis premion en la Ekspozicio de la Tutlandaj Superaj kaj Novaj Teknikaj Produktoj "Torĉo". En decembro de la sama jaro ĝi ricevis oran medalon en la 6-a Tutlanda Konkurso de Inventaĵoj. S-ro Yang Zibin, estro de la Juĝkomitato de la Medicinaj Instrumentoj sub la Higiena Ministerio de ĈPR kaj prof. de la Ĉina Medicina Universitato Xiehe, plurfoje raportis tiun inventon al la internacia medicinista rondo, opiniante, ke ĝi estas grava frukto de ĉinaj medicinistoj en kombino de la tradicia ĉina medicino kun modernaj teknikoj. La aparato nun estas multe atentata de eksterlandaj fakuloj. Kiel patentita de la altteknika entrepreno investita kune de Ĉinio kaj aliaj landoj — la Pekina Internacia Limigita Kompanio de Elektronikaj Medicinaj Ekipaĵoj Daye, la tumor-lokalizilo estas liverata en dekelkaj ĉinaj kaj alilandaj vendejoj. ■

Paciento ekzamenata



Vojaĝo al la Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero

de GUAN LI

TIU ĉi estas speciala itinero por vi. La itinero longa je 1 370 km komenciĝas de la urbo Chongqing (Ĉongĉing) en la supra baseno de Yangzi-rivero kaj finiĝas en la urbo Wuhan en la meza baseno de la rivero. La surŝipa vojaĝo daŭras 4 tagojn. En la vojaĝo vi povas ĝui la belan pejzaĝon de la Tri Gorĝoj surŝipe kaj ankaŭ elŝipiĝi por viziti pitoreskejojn ambaŭborde.

En Chongqing funkcias la luksa plezurŝipo Yangzi-paradizo kaj malpliluksaj ŝipoj Bashan, Diino kaj Emei. La plezurŝipoj iras tagnokte. Kaj vi neniel preterlasu la okazon ĝui la pejzaĝon de la Tri Gorĝoj!

La Tri Gorĝoj estas Qutang (Ĉjutang), Wuxia (Uŝja) kaj Xiling (Ŝjiling). De antikve ili estas konataj kiel naturaj danĝeraj lokoj. Ili, 193 km longaj, komenciĝas de la fama antikva urbo Baidi en okcidento kaj finiĝas ĉe Nanjin-pasejo de la urbo Yichang en oriento. La plezurŝipo unue eniras en Qutang-gorĝon. Qutang estas fama pro sia imponeco kaj danĝereco. Tie, ambaŭborde de la rivero, staras apikaj montoj kun ĉielskrapantaj pintoj, kaj la rivero torentas. Ho, vere majeste kaj animskue! Kompare kun Qutang, Wuxia-gorĝo estas kvietta. Tie sidas 12 belaj montpintoj, ili ĉiuj estas mirindaj kreaĵoj de la naturo. 3 montpintoj el la 12

estas nevideblaj sur la ŝipo, sed vi ne bedaŭru tion! La pinto Diino, plej fama el la 12 montpintoj, atendas vin en nuboj. Kvazaŭ svelta knabino, ĝi staras ĉe la bordo de la rivero kaj benas la vojaĝantojn. Ĝi estas admirata de ĉiuj turistoj. Pro tio, vi neniel preterlasu la okazon rigardi ĝin. La gorĝo Xiling estas la plej longa el la Tri Gorĝoj. Tie la rivero zigzagas kaj torentas furioze. En la rivero danĝeras arbaro da rifoj. Ŝipe veturante kontraŭ la fluo tie, vi sentas vin kvazaŭ en natura galerio. La rivero jen torentas furioze, jen fluas milde. La ĉarmaj montoj ambaŭborde de la rivero aspektas kiel verdaj kurtenoj en serena tago kaj estas nebulaj en pluva tago, kvazaŭ kuniĝinte kun la ĉielo. En ĉiuj sezonoj, ĉu la tago hela aŭ malhela, ĉu pluva aŭ neĝa, ili allogas la turistojn per sia aparta beleco.

En la vojaĝo vi povas elŝipiĝi en Fengdu kaj viziti la tiean Diablan Domon. Ĝi estas grandioza templo kun multaj statuoj de dioj kaj diabloj ene. Laŭ mito, tie estas Hadeso. La submonda dio laŭdas la mortintojn, farintajn bonajn en sia vivo, kaj donas al ili feliĉan destinon, kaj li kondamnas la insidemulojn al la puno, ke ili estu kruele turmentataj en la infero. Antikvaj ĉinoj starigis la templon ja por la bono kaj kontraŭ la malbono, sed nun ĝi servas kiel vidindejo.

Kiam la ŝipo atingas Shibaoz-

hai, de malproksime vi vidas la kvadratan rokegon kun malhelruĝa templo sur ĝi. La rokego, 100 m alta, staras ĉe la bordo. La templo aspektas solece kaj majeste.

La ŝipo iras daŭre kaj vi atingas la Malgrandajn Tri Gorĝojn, t.e. la gorĝojn Longmen, Bawu kaj Dicu. Kompare kun la Tri Gorĝoj, ili aspektas mildaj kaj ĉarmaj. Tie la rivero estas klara. Ambaŭborde prosperas arboj, groteskas ŝtonaj montpintoj. Vere poezia loko! Tie vi vidas restaĵojn de antikvaj kornicaj vojoj sur rokmuroj, pendantajn ĉerkojn kaj simiojn jen aperantajn jen malaperantajn en la arbaro...

Jen antaŭ vi estas Jingzhou, strategia loko en la ĉina historio. En Jingzhou-muzeo vi povas vidi silkaĵojn, bronzaĵojn, lakaĵojn k.a. elterigitajn tie. En la muzeo kuŝas ankaŭ la plej frua mumio de Ĉinio.

La ŝipo daŭrigas iradon kaj atingas la rivereton Shennongxi. Se vin tiklas la scivolemo, vi povas elŝipiĝi kaj per boato profundiĝi en la rivero por viziti la lokon de "sovaĝuloj".

Zigui estas la hejmloko de Qu Yuan (Ĉju Jŭan), antikva ĉina patriota poeto. Tie oni povas viziti la Templon de Qu Yuan kaj lian tombon. Krome, tie estas interesaj la moroj en la antikva urbeto. Eble estos granda ĝojo por vi, se via vizito koincidos kun drakboata konkurso.

Kiam la plezurŝipo atingas Wuhan, finiĝas nia itinero. Vi povas de tie flugi al Ŝanhajo, por daŭrigi vian vojaĝon per aliaj itineroj aŭ forlasi Ĉinion.

Dum via vojaĝo vi povas elŝipiĝi por viziti pejzaĝojn surtere aŭ ĝui ilin surŝipe, tute laŭ via plaĉo, sed en ĉia okazo vi ne forgesu kunporti pluvŝirmilon kaj turismajn ŝuojn! ■

En Bazaro de Malnovaj Popolaj Artajoj de Pekino

de LI QIANG

EN la Bazaro de Malnovaj Popolaj Artajoj aŭkciisto sur la podio petis, ke lia helpanto alportu paron da porcelanaj bovloj, kaj deklaris al la konkurantoj: "Tiuj fajnaj kaj bone konservitaj bovloj kun ruĝeta kovrilo havas historion de ĉ. cent jaroj kaj oni aŭkciu ilin en baza prezo de 500 juanoj."

Montrante sian numeran tabulon, la aĉetantoj laŭte kriis por doni sian aĉetprezon. Ĉiujfoje ili altigis la prezon je 50 juanoj. Kiam la prezo atingis 950 juanojn, silentiĝis la konkurantoj. La aŭkciisto denove demandis la aĉetantojn kaj vidante, ke neniu el ili plu volas

altigi la prezon, la aŭkciisto frapis gongon, kaj plenumiĝis la aŭkcio.

En malpli ol tri horoj ĉ. 60 artajoj, kiaj palisandra meblo, porcelanaĵo kun bluaj desegnoj, granda tuĉinkujo, horloĝo produktita en Suzhou en Qing (Ĉing)-dinastio (1644-1911) kaj granda damaskenita kupra incensujo en bela formo, ĉiuj estis konkure aĉetitaj en prezo multe pli alta ol la baza. Tiuj, kiuj malsukcesis en la aŭkcio, decidis partopreni alifojan aŭkcion, por aĉeti artaĵojn konservindajn kaj aprecindajn.

Kvankam oni okazigis diversajn aŭkciojn multfoje, tamen

tiu ĉi aŭkcio altiris nemalmultajn aĉetantojn pro tio, ke oni unuafoje aŭkciis popolajn artaĵojn, selektitajn el granda nombro da malnovaj popolaj artaĵoj.

La ĉifojan aŭkcion okazigis la Bazaro de Malnovaj Popolaj Artajoj de Pekino, kiu situas en sudorienta Pekino. Tie mi intervjuis Zhong Quan (Ĝong Ĉjūan) kaj Dong Jiangnan, vicestrojn de la administrejo de la bazaro.

S-ro Zhong diris, ke antaŭe tiu ĉi bazaro ne estis granda, tamen kolektiĝis tie multaj etvendistoj, kiuj speciale vendis antikvaĵojn kaj malnovajn popolajn artaĵojn. Pro nebona administrado, la bazaro estis en malordo. Por pli bone administri la vendadon de historiaj objektoj ni starigis la bazaron, unuan en Ĉinio.

Akompanate de la vicestroj, mi vizitis malgrandajn butikojn de la bazaro, ĉiu kun propra karakterizaĵo. Iuj estas destinitaj por porcelanaĵoj, aliaj por palisandraj mebloj, kaj triaj por ĉinstilaj pentraĵoj kaj kaligrafiaĵoj. S-ro Zhong diris, ke la bazaro liveras ĉ. milon da specoj da artaĵoj, ekz., ĉinajn kaj alilandajn porcelanaĵojn, perlojn, juvelojn, diamantojn, oraĵojn, arĝentaĵojn, malnovajn meblojn, jadaĵojn, ŝtonajn, ostajn kaj eburajn skulptaĵojn, brodaĵojn kaj

En aŭkciejo



Pri la ekstera politiko de Finnlando en la pasinteco

de IVAN KO

LA FINNA VOJO verkita de d-ro Urho Kekkonen, prezidento de Finnlando de 1956 ĝis 1982, tradukita de Osmo Buller kaj eldonita de Oy Mendservo AK (Finnlando). 109 p. Prezo neindikita.

Jen estas libro, en kiu d-ro Urho Kekkonen, la oka prezidento de Finnlando, priskribis la ekeston kaj esencon de la ekstera politiko de tiu lando post la Dua Mondmilito.

En la komenco de la libro d-ro Kekkonen diris, ke lia fundamenta celo estas konservi la suverenecon kaj sendependecon de Finnlando en ĉiuj cirkonstancoj kaj kune kun tio prizorgi la sekurecon kaj bonfarton de la civitanoj. Li emfazis, ke flanke de Finnlando la estiĝo de la politiko de paco kaj amikeco inter Finnlando kaj Sovetunio nekontesteble estas nacia necesajo.



La libro konsistas el 10 ĉapitroj. D-ro Kekkonen komence traktis pri la sekureco de la nacio, poste skribis pri la najbareco de Finnlando kaj Sovetunio kaj pri AKI-Traktato (Traktato pri Amikeco, Kunlaboro kaj Interhelpo inter Finnlando kaj Sovetunio) kaj konsideris Finnlandon kiel nordian kaj eŭropan

landon same kiel membron de la monda komunumo. Troviĝas en la libro ankaŭ komentarioj pri la rilatoj inter Finnlando kaj evolulandoj, pri komerca kaj ekstera politiko, pri popolopinio kaj pri politiko de neŭtraleco.

Nun okazis grandaj ŝanĝoj en Sovetunio kaj en la orient-eŭropaj landoj, tamen tiu ĉi libro ankoraŭ valoras kiel historio pri la postmilita ekstera politiko de Finnlando kiel malgranda lando apud najbara granda potenco en la pasinteco.

Kelkaj eksterlandaj esperantistoj kunlaboris kun Osmo Buller, tradukinto de la libro, en la prespretigo kaj kompostado de la traduko. S-ro Matti Kekkonen, registara konsilisto de Finnlando, afable permesis eldoni en la internacia lingvo tiun ĉi verkon de sia patro. ■

klozoneaĵojn. Montrante la delikatajn artaĵojn, vicestro Dong diris al mi: "Tiuj objektoj estas ekspertizitaj de la administra departemento pri historiaj objektoj. Se aĉetantoj kunportos ilin eksterlanden, ni algluos al ili specialajn markojn. Kun fakturo kaj marko, tiuj objektoj povas trapasi la ekzamenon de dogano." Alilandaj laborantoj, turistoj kaj komercistoj en Pekino tre ŝatas viziti la butikojn en la bazaro, ĉar tie ili povas ne nur

apreci la tradician ĉinan kulturon, koni ĉinajn morojn kaj kutimojn, sed ankaŭ aĉeti ŝatatajn objektojn.

Ili konigis al mi, ke en la bazaro servas ĉ. 130 ŝtataj, kooperaj kaj privataj butikoj de Pekino, Tianjin (Tjangin), Hebei, Guangdong, Jiangxi (Ĝjangŝji), Xinjiang (Ŝingĵang), Shanxi (Ŝanŝji) k.a., interalie, la privataj butikoj konsistigas 94%. Por plivastigi la bazaron, oni planis investi 17 milionojn da juanoj.

Estonte, tie servos 600-700 butikoj, aŭkcia halo, serva centro, restoracio, hotelo kaj granda garaĝo. La nova bazaro fariĝos sinteza bazaro de artaĵoj. Krom antikvaĵoj, oni vendos ankaŭ popolajn metiartaĵojn de Ĉinio, ekz., argilajn, farunajn kaj vaksajn figurojn, papertondaĵojn kaj nacimalplimultajn kostumojn. La bazaro ludos gravan rolon por disradii la ĉinan kulturon, disvolvi turisman aferon kaj akceli la kulturalan interŝanĝon inter Ĉinio kaj aliaj landoj. ■

AMUZOJ

Suzanna Barabas, profesorino de bazlernejo en Rumanio, estas leganto de EPĈ, kiun tre interesas nia rubriko "Amuzoj". Ŝi sendis al ni ne nur sian solvon, sed ankaŭ krucvort-enigmon faritan de ŝi mem, kiu estis publikigita en la 1-a numero de EPĈ, 1993. Tiu ĉi enigmo estas ŝia dua kontribuajo. Ni ege dankas ŝin, ke ŝi varme subtenas nin, kaj ni petas, ke pli multe da legantoj zorgu pri kaj partoprenu en la aktivado de "Amuzoj".

La Red.

PROVERBOJ

Proverboj troviĝas ĉe 1. horizontale kaj 21. vertikale. (R — signifas vortradiko)

Horizontale:

1. Unua proverbo (fermitaj literoj: U, S, F, O, S). 11. Sufikso, kiu indikas virinan sekson. 12. Kosma spaco. 13. Movi kun si (objekton) (R). 14. Uzi siajn fortojn. 15. Instrumento. 16. Intense. 17. Simbolo de brila blanka metalo. 18. Arbo el la familio de l' liliacoj (R). 19. Eŭropa homo (R). 20. A. F. 22. Indikas la komparativan gradon de la adjektivo. 23. Vira nomo. 24. Povas esti. 26. Ĉirkaŭbarita arta arbaro por promeno. 27. Simbolo de kemia elemento uzata en fotografarto kaj medicino. 28. Substanco uzata por kunigi du objektojn (R) 29. Probableco de sukceso. 30. Insektomanĝa birdo kun longa beko kaj lango (R). 31. Sufikso sen fiksitaj signifo por derivi vortojn. 32. Malpeza kaj maldensa teksaĵo. 33. Konvene. 34. Reen: mahometana religio (R). 35. Prepozicio esprimanta malproksimiĝi de io. 36. Sama kiel 20. horizontala. 38. Parto de Hindio. 39. Religia ceremoniaro (R). 40. Signo de kemia elemento el la grupo de termetaloj. 41. Vertebrulo, la plej proksima al la homo. 43. Poseda pronomo. 44. ...Vegas — nomo de

loko en Usono. 45. Literoj de vortradiko "mank". 46. Marko. 48. A.N.

Vertikale:


1. En kiu tempo. 2. Objekto, en kiun oni enigis, fiksas ekstremoj de alia objekto. 3. Kondiĉa konjunkcio. 4. Alporti profiton. 5. Subtera ejo. 6. Simboloj de kemiaj elementoj: malmola, grizeta metalo kaj oksigeno. 7. ...ipso — memkompreneble (en la latina lingvo). 8. Antikva, greka Sundio. 9. ...Rondane — montaro en Antarkto. 10. Speco de triangulo. 16. Manĝilo. 18. Vojo en ĝardeno (R). 19. Sortdiino en romana mitologio. 21. Dua proverbo (fermitaj literoj: N.T.I.E.E). 22. Kaj tiel

... 23. Eligi voĉe melodiajn sonojn. 25. B.L.M. 26. Bandagi. 27. ... Hur — amerika filmo (1959), reĝisoro William Wyler. 29. Devigiteco. 30. Prepozicio kaj konjunkcio, esprimanta celon. 32. Subita, ofte senbaza timo. 33. Piedvesto (R). 35. Persono, kiu faris solenan promeson edziĝi (R). 37. Laste. 39. Ĉefurbo de Latvio. 40. Ĉieldio en Fenicio. 42. Prefikso por kontraŭa senco. 43. Rezervujo por cerealoj (R). 46. Simboloj de svedaj kaj luksemburgaj aŭtoj. 47. Vokaloj. 49. Duono de nodo.

(Solve trovebla en la sekvanta numero)

Solve por la krucvort-

enigmo de la 1-a numero



ABONTARIFO DE EPĈ

Lando	Valuto	1 Jaro	Sendokosto	Totalo
Aŭstralio	AUD	18.70	16.00	34.70
Aŭstrio	ATS	192	128	320
Belgio	BEF	575.00	375.00	950.00
Germanio	DEM	27.30	18.20	45.50
Britio	GBP	9.20	6.30	15.50
Finnlando	FIM	61.40	49.60	111.00
Francio	FRF	88.00	62.00	150.00
Italio	ITL	20200	13800	34000
Nederlando	NLG	27.50	23.50	51.00
Nov-Zelando	NZD	25.60	22.00	47.60
Svisio	CHF	23.00	16.50	39.50
Usono	USD	14.00	12.00	26.00
Kanado	CAD	16.80	14.40	31.20
Japanio	JPY			4140
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	USD	14.00	12.00	26.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko, Latin-Ameriko, Orient-Eŭropo kaj Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj:				
	USD			14.40

Geedziĝa moro de tuĝja-oj

Teksto de CHUAN BIAO

Fotoj de HAN HONG

EN la longa historia evoluo ĉiu nacio formis siajn proprajn morojn kaj kutimojn, kiuj spegulas ĝiajn ideologiojn kaj kulturon. En Ĉinio vivas 56 nacioj ĉiu kun siaj propraj naciaj moroj. Iliaj geedziĝaj moroj estas diversaj. Tion persone spertis alilandaj turistoj, kiuj vojaĝis en Ĉinio kaj geedziĝis laŭ geedziĝaj moroj de ĉinaj nacioj. Sube mi prezentos al vi geedziĝan moron de tuĝja-oj.

Tuĝja-oj vivas ĉefe en la bela montregiono limtuŝanta la provincojn Hubei, Hunan, Sichuan kaj Guizhou. Ili, kun longa historio, estas laboremaj, bravaj kaj saĝaj. Kiel bela floro en profunda monto, la geedziĝa moro de tuĝja-oj elspiras antikvecon, imponecon, misteron kaj elegantecon.

Kiel iras la nupto?

Estas ja kurioza kaj tre interesa la edziniĝo en plorado. Ĝenerale, la novedzinoj esploras duonmonaton antaŭ sia edziniĝo, tion oni nomas edziniĝa plorkanto, ĉar ili ploras ritme kun teksto bele aranĝita. Geedziĝo estas ĝojiga afero en la homa vivo, sed kial la tuĝja-aj knabinoj ploras pri ĝi? Ili ploras por plendi kontraŭ la malnova geedziĝa sistemo kaj pro sia disiĝo de la familianoj kaj hejmloko. Laŭdire, estas ankaŭ novedzinoj, kiuj laŭte lamentas por akiri de siaj gepatroj pli multe da dotoj.

En la geedziĝa ceremonio, akompanate de 4 knabinoj, la novedzino, plorante adiaŭas siajn gepatrojn en la salono. Poste, ŝia pliaĝa frato portas ŝin surdorse al la

palankeno. Ĉe la eldomiĝo la novedzino piedbatas la sojlon. Tio estas ŝia ĵuro al la familianoj, esprimante, ke post la edziniĝo, ŝi certe estos laborema por feliĉo kaj riĉeco. Sur la ŝtupo de la pordo, ŝi devas piedbati la bazon de *ŝeng-o*, grena mezurilo de tuĝja-oj. Tio signifas, ke ŝi deziras al la gepatra familio riĉan rikolton ĉiujare.

Ekstere, petolemaj knaboj eniras en palankenon kaj eliras el ĝi, por trudpeti ruĝan paketon kun mono, dirante, ke ili ne elpalankenigis, se la novedzino ne donus al ili la paketon. Je tio oni ĵetas al la ĉielo ruĝajn paketojn. Tio sugestas al la novaj geedzoj feliĉon kaj, ke ili havos gefilojn. Poste, bofratino de la novedzino alportas bolvon da akvo, kaj la patrino de la novedzino trempas siajn fingrojn en la akvo kaj viŝas la 4 angulojn de la palankeno, poste ŝi verŝas la akvon sur la tegmenton de la palankeno. Tio signifas, ke la patrino preĝas al ĉielo kaj dioj, dezirante al sia filino ĉion bonan en la tuta vivo.

Antaŭ forlaso de la hejmo la patro de la novedzino, ĵetas brulantan torĉon trans la palankenon tegmenton kaj ŝia patrino — paron da mangbastonetoj. Fajro simbolas lumon. Jen la patro deziras al sia filino brilan estontecon, kaj la patrino feliĉan vivon kaj, ke ŝi havu filon kiel eble plej baldaŭ.

Survoje al la novedza hejmo, ofte okazas, ke pasantoj petas de la novedzino bombonojn.

La novedza domo de longe estas saturita de ĝojo kaj feliĉo: ruĝaj lanternoj lumas antaŭ la meza ĉambro, sur la pordo brilas ruĝaj

versparoj kaj sur la fenestroj okulfrapas papertranĉaĵoj.

Kiam la palankeno proksimiĝas al la korto de la novedzo, oni renkontas prezidanton de la nupto, kiu baras la vojon al la novedzino. Tie kuŝas longa benko kun tasoj, papermono k.a. sur ĝi. Portante maskon sur la kapo, la prezidanto murmurante, buĉas kokon, verŝas la kokan sangon en la tasojn, sur la sojlon kaj aliajn lokojn. Tuj poste, akompanate de viro kaj virino, en tamburado kaj gongado li dancas dancon apartan de tuĝja-oj. Fine li forlasas la ĵus buĉitan kokon post la palankenon. La koko rabie saltas, tio signifas, ke ĉio malbona estas forigita. Tio celas ankaŭ por gardi la virtecon de la familio kaj beni la novajn geedzojn.

Kiam la bogepatroj de la novedzino malfermas la palankenon kurtenon kaj akompanas la novedzino eniri en la novgeedzan korton, la novedzino forte piedpremas la sojlon, per kio ŝi montras sian dignon, esprimante, ke ŝi estas ne ofendebla. Tio montras la malcedemecon de la tuĝja-aj knabinoj, kiuj ne timas la feŭdisman patriarkecon.

Antaŭ komenco de la geedziĝa ceremonio, la ĉeestantaj spektaklemuloj svarme sin trudas en la nuptan salanon, sed antaŭ la pordo la prezidanto de la nupto detenas la gepatrojn kaj gefratojn de la novedzo kaj malpermesas al ili endomiĝi. Tiu moro nomiĝas “ne ĉeesti la varman scenon”. Jen signifoplena tabuo de geedziĝa moro de tuĝja-oj: En la okuloj de tuĝja-oj, la familianoj de la novedzo devas eviti renkontiĝi kun la novedzino, kiam ŝi eniras en la nuptejon, nur tiele, ili vivos harmonie en la estonteco.


La prezidantino laŭte krias: adorkliniĝu al la Ĉielo kaj Tero! Al la prapatroj! La geedza paro reciproke adorkliniĝu! Feliĉa fortune eniru en la novgeedzan ĉambro! Eksplozigu petardojn! Ludu muzikon!

Tuj leviĝas ĝoja muziko. Viroj, virinoj, junuloj kaj maljunuloj ekdancas gajajn tuĝja-ajn dancojn. Kompreneble inter la ĝojaj dancantoj plej feliĉa estas la novgeedza paro. ■




Plorado antaŭ la edziniĝo

Novedzo kaj novelzino




Bonvenigo al novelzino

Danco en nupto





Çe adiaũ




EKONOMIO

- En 1992 la petrolrafina povo de Ĉinio atingis 144 milionojn da tunoj kaj okupis la kvaran lokon en la mondo. Ĝia produktopovo de etileno atingis du milionojn da tunoj kaj okupis la okan lokon en la mondo. La produktokvantoj de sintezaj rezino kaj kaŭĉuko kaj kemisterko kreskis per granda proporcio.

- Dank' al la vilaĝaj entreprenoj, aperintaj de la 80-aj jaroj, la ĉina kampara ekonomio, stagninta dum longa tempo, rimarkinde progresis. En 1981-1991 la totala produktovaloro de la vilaĝaj entreprenoj kreskis averaĝe je 29.6% ĉiujare, en 1991 ĝi atingis 1160 miliardojn da juanoj. La faktoj pruvis, ke la ekonomia modelo el vilaĝoj, asociitaj familioj kaj individuoj adaptiĝas al la aktualaj kondiĉoj kaj nivelo de la nuna produktado de Ĉinio.

- La Unua Agrikultura Foiro de Ĉinio en Pekino montris, ke en 1992 greno, koton, oledonaj plantoj, tabako, kokonoj, legomoj, fruktoj kaj akvoproduktaĵoj de Ĉinio ricevis riĉan rikolton, malgraŭ naturaj katastrofoj.

Krome, en la foiro eksponiĝis agrikulturaj, brutobredaj, fiŝkaptaj kaj prilaboraj produktaĵoj kaj agrikulturaj maŝinoj, kaj 650 produktaĵoj gajnis



S-ro Ren Wuzhi (dekstre) donas agnoskan ateston al O'Kying Chilai.

kune de Ĉinio, Germanio kaj Koreio, kun areo de ĉ. 40 000 kvadrataj metroj vendas pli ol 300 000 sortimentojn da varoj kun 70 000 specoj. La konstruaĵo en eŭropstila strukturo estas 6-etaĝa, ekskluzive de la subtera etaĝo. Kun ekipaĵoj avangardaj, aĉetmedio komforta kaj servo fervora, ĝi estas la plej moderna magazeno en Pekino.

SOCIO

- La 27-an de septembro 1992, La sekto Garma Kagyudpa de la tibeta budhismo okazigis grandan ceremonion por la 17-a viva budho Garmaba, kiu ascendis la sanktan tronon en la monaĝejo Curbo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono. S-ro Ren Wuzhi (Ĵen Uĝi), estro de la Buroo de Religiaj Aferoj de la Ŝtata Konsilantaro, donis agnoskan ateston al knabo O'Kying Chilai, la enkarniĝinta animo de la 16-a viva budho Garmaba. Kaj per tio li estis oficiale aprobata kiel la 17-a viva budho Garmaba.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

- La 6-an de oktobro 1992 Ĉinio sukcese lanĉis per unu transporta raketo du satelitojn — la 14-an revenigeblan scienc-esploran kaj teknik-eksperimentan sateliton de Ĉinio kaj la scienc-eksperimentan

sateliton Freja de Svedio en sia Jiuquan (Ĝiŭĉjŭan)-a Satelit-lanĉa Centro. Ĉinio glate plenumis la kontrakton pri lanĉo de satelitoj por Svedio.



La Pekina Lufthansa-a Magazeno

oran medalon de la foiro, la plej altan premion por agrikulturaj produktaĵoj de post 1949.

- La Pekina Lufthansa-a Magazeno, investita

- Ĉinaj kaj japanaj sciencistoj sukcese kulturis vinberujojn sur la dezerto Tenger, kie la naturaj kondiĉoj estas ekstreme malbonaj kaj la meznombra jara pluvokvanto estas nur 186.2 mm. Tio havas gravan signifon por Ĉinio pri grandskala utiligo de dezerto. La tieaj vinberoj enhavas 25.2% da sukero. Unu hektaro da vinberujoj povas doni pli ol 27 000 kg da vinberoj.

SPORTO

- La 30-an de oktobro 1992, membroj de la Ĉina kaj Japana Montgrimpista Teamo surgrimpis la montpinton Namjagbarwa, konkeritan neniam antaŭe.

La montpinto, 7 782 m super la marnivelo, estas la plej alta en la orienta parto de Himalajo. Tie la montoj estas krutaj, vetero ŝanĝiĝema kaj ofte okazas lavango. La montgrimpistoj per sia sukceso faris alian senprecedencan agon en la montgrimpa historio de la mondo.

ARTO

- La Zhuhai-a Limigita Kompanio de Gemaj Juveloj de Guangdong-provinco komencis fari "tronon", grandan artan trezoron kun la imperiestra trono en Taihe-halo de la Imperiestra Palaco en Pekino. La projekton plenumis majstro-artisto Zeng Yibing de Pekino. Por fari la artaĵon oni bezonos 86 kg da oro kaj inkrustos ĝin per dekmiloj da pecoj da smeraldo, diamanto, rubeno k.a. Ĝi estos farita kaj aŭkciita en 1993.

ARKEOLOGIO

- La Ĉina Buroo de Historiaj Objektoj montris, ke en la lastaj jaroj ĉinaj kaj usonaj arkeologoj elfosis en la baseno Nihewan de Hebei-provinco ruinon de paleolitiko, kaj konfirmis, ke la praa kulturo de Ĉinio datiĝis de almenaŭ miliono da jaroj. La eltrovo rompis la tezon, ke la tempo, kiam homoj eniris en Azion, neniel komenciĝis antaŭ miliono da jaroj, pri tio dum longa tempo oni opiniis internacie.

KURIOZA NOVAĴO

- Jam malkovriĝis la enigmo pri la Terura Valo de Xinjiang (Ŝinĝjang), kiu faris sensacion en la 80-aj jaroj.

La nomita valo kun longo de pli ol cent km komenciĝas de Shashanmonto de Xinjiang okcidente kaj finiĝas ĉe Buluntai de Qinghai or-

iente. En la valo ne vidiĝas homoj, sed nur blankaj ostoj. Fakte la valo estas zono ofte atakata de tondroj. Sciencistoj konstatis post esploro, ke la tiea magneta kampointenso atingas 1 000-3 000 gamaojn, tiel ke ne bone funkcias tie kompasoj kaj aliaj aparatoj. La fortega magneta efekto povas alkonduki ŝargojn de tondro, nuboj kaj pluvo. Kaj plie, tie ofte kolektiĝas malseka aero kaj formiĝas superpotenca magneta kampo. Pro tio homoj kaj bestoj, apenaŭ enirinte la valon, mortas pro elektroŝoko.


KULTURO

- Nun pli ol 15 000 personoj el 150 landoj partoprenis en la ekzameno pri la han-lingvo, kiu estas nomata ĉina TOEFL. Plejparto el ili ricevis diplomon pri la nivelo de la lingvo. La ekzameno estas starigita nur por kontroli la han-lingvan nivelon de alilandanoj kaj neĥanoj. Ĝi estas zorgata en kaj ekster la lando. Pli kaj pli multaj landoj petis fari tian ekzamenon.

- Kuriozaj trezoroj konservataj en la Somera Palaco de Pekino unuafoje eksponiĝas en Qinghuan (Ĉinghŭaŝjŭan)-halo de la parko. Pli ol 100 pecoj uzitaj de imperiestroj kaj iliaj edzinoj de Qing-dinastio (1644-1911), kiel la unuaj eksponaĵoj, estas parto de la konservaĵoj. Ili estis faritaj en ĉ. 2 000 jaroj de Shang-dinastio ĝis Qing-dinastio.

Inter la eksponaĵoj estas senprezaj skulptitaj jadaĵoj, kupraĵoj kaj porcelanaĵoj, kuriozaj olepentraĵoj de alilandaj pentristoj, kaj ankaŭ pentraĵoj kaj skribulaĵoj de imperiestroj kaj iliaj edzinoj k.a. La trezoroj eksponiĝos en longa tempo kaj oni anstataŭigos iujn el ili per neeksponitaj, se necese.

La Fushun-a Lesiva Fabriko, la plej granda bazo de sinteza lesivo en Azio



PRI UTILIGO DE VENTA ENERGIO EN ĈINIO

• Antaŭ longe Ĉinio komencis utiligi ventan energion. Historiaj verkoj diras, ke antaŭ 3 000 jaroj ĉinoj jam uzis velon. En 1405-1433 ĉina navigisto Zheng He sepfoje veturis trans marojn kaj oceanojn, kun ekspedicio sub sia gvido, per grandaj marŝipoj, ĉiu kun 12 veloj.

En Ming-dinastio (1368-1644) venta energio estis vaste aplikata en prilaborado de agrikulturaj kaj akcesoraj produktoj kaj akvopumpado por irigacii kampojn. La nun retrovita unusola bildo de vertikala ventmotoro, rivolua ventilo de Ĉinio, prezentas, kiel uzi ventadon en la antikva Ĉinio.

En la mezo de la 50-aj jaroj komenciĝis en Ĉinio provfarado de malgrandaj vent-energiaj akvopumpiloj kaj generatoroj. En la 60-aj jaroj oni faris malgrandan kvanton da vent-energiaj akvopumpiloj, per kiuj ili sukcese ŝanĝis la vent-energion en produktajn fortojn. Fine de la 70-aj jaroj la esplorado pri utiligo de venta energio en Ĉinio eniris novan etapon.

En la komenco de la 80-aj jaroj estis muntitaj malgrandaj vent-energiaj generatoroj en la Interna Mongolio de Ĉinio. Ili donis elektron por lumigo, ŝaftondado kaj funkciigo de televidilo, son-registraloj kaj drat-barilo. En la fino de 1991 funkciis en Ĉinio ĉ. 110 000 vent-energiaj generatoroj. Pli ol 80% de ili laboris en la Interna Mongolio. Kaj krome, en la lando funkciis ankaŭ 3 000 vent-energiaj akvopumpiloj.

En 1985 Ĉinio importis el Danlando vent-energiajn generatorojn kun kapacito de 55kW. La 3-an de majo samjare ekfunkciis tri tiaj generatoroj en Malan, Rongcheng (Ĵongĉeng)-gubernio, Shandong-provinco. Tio montris la transiron de la energio por vivo al tiu por produktado en utiligo de venta energio en Ĉinio. Poste, Ĉinio importis grandajn kaj mezgrandajn vent-energiajn generatorojn el Nederlando, Germanio, Belgio kaj Usono. En 1991 en pluraj elektrejoj de la lando eklaboris tiaj generatoroj kun kapacitoj de 100kW, 150kW, 200kW kaj 300kW.

TIBETAJ MEDICINO KAJ MEDIKAMENTOJ

La nomitaj medicino kaj medikamentoj elspiras fortajn naciajn trajtojn. Ili formiĝis surbaze de la riĉaj spertoj, akumulitaj de la tibeta popolo en la longtempa batalo kontraŭ malsanoj kaj medicinaj sukcesoj de Hindio kaj internaj lokoj de Ĉinio. Ili estas grava konsistiga parto de la tradicia ĉina medicino. Kiel la ĉefa farmakopeo de la tibeta medicino,

la libro "Juxi" (Ĝjuŝji) estas enhavoriĉa kaj multe interesata de fakuloj en multaj landoj kaj regionoj en la lastaj jaroj.

La tibeta medicino sin bazis sur aparta teoria sistemo. Ĝi strikte rilatas al astronomio kaj kalendaro. Ĝuste pro tio, multaj tibet-medicinaj fakuloj estas ankaŭ elstaraj astronomoj. Dum diagnozo, krom observado de la vizaĝkoloro, lango kaj mieno de la paciento, palpado de la pulsado kaj demandado pri la simptomoj, la tibet-medicinaj kuracistoj tre taksas urino-observadon. En kuracado ili uzas medikamentojn vegetalajn, bestajn kaj mineralajn, kaj ankaŭ punkcion kaj sangoellason.

La tibetaj medicino kaj medikamentoj pli disvolviĝas de post la liberigo de Tibeto en 1951. Nun en Tibeto funkcias 5 tibet-medicinaj hospitaloj. 75 hospitaloj havas tibet-medicinan fakon. En la tuta aŭtonoma regiono preskaŭ duono de la pacientoj vizitas tibet-medicinajn kuracistojn. Nun estas pli ol 2 000 specoj da tibetaj medikamentoj kun ĉ. 10 000 receptoj, kiuj estas tre efikaj por kuraci hipertension, kormalsanojn, apopleksion kaj cerban hemoragion.

La tibetaj medicino kaj medikamentoj ja naskiĝis en la landlimo de Ĉinio, tamen ĝi havas grandan influon en Usono, Francio, Nepalo, Hindio kaj aliaj landoj.

ĈU VI TRINKAS SUFIĈE ĈIUTAGE?

Krom aero akvo estas plej grava por la homa vivo. Sen akvo ni estas toksitaj de skorio produktita en la korpo. La renoj eligas ureaton kaj ureon nur, kiam tiuj solviĝis en akvo. Se ne estas sufiĉe da akvo en la homa korpo, la skorio ne eliĝos facile kaj iom el ĝi fariĝos rena litiazo. Akvo estas necesa ankaŭ por digesto kaj metabolo. Krome, ĝi funkcias kiel lubrikaĵo por la artikoj. Ni bezonas akvon eĉ por spiri. Nur malsekaj pulmoj povas enspiri oksigenon kaj elspiri karbonan dioksidon. Sole por spirado oni konsumas duonlitron da akvo ĉiutage. Se vi ne trinkas sufiĉe da akvo, tio malutilos al ĉiuj partoj de la korpo. Iu usona fakulo pri obezeco diris: "Sen sufiĉe da akvo multaj homoj havos tro da graso kaj pli da tokso en la korpo, muskolojn kun malkreskanta elasteco, digeston malfortigantan, kaj suferos de artika kaj muskola doloroj kaj hidropso." Fakuloj opinias, ke por sengrasigi sin, oni devas trinki akvon modere.

Vintre oni devas trinki almenaŭ 8-10 glasojn da akvo ĉiutage (unu glaso entenas akvon de 0.24 litro). La Internacia Instituto pri Kinezo de Usono formulis la kvanton de akvo trinkenda por la homo ĉiutage, t.e., nesportemuloj bezonas 0.015 litron da akvo po funto da korpopezo; sportemuloj bezonas 0.02 litron po sama pezo de la korpo. Oni devas trinki kaj tage kaj nokte.

Sur Bayanhar-montaro

Teksto de WANG XIAN

Fotoj de ZHENG YUNFENG

FORLASINTE la Riverfontan Vojon sur la Antikva Vojo al Tibeto, ni troviĝis tuj antaŭ Tibeto. Por eniri Tibeton estas du vojoj: Unu estas la arteria, kiu kondukas al la gubernioj Baqen (Baĉen) kaj Suoxian (Suoŝjan) en norda Tibeto, tra Cha'ulamontpasejo ĉe la limregiono de Tibeto kaj Qinghai (Ĉinghaj)-provinco. La alia estas la branĉa. Ĝi etendas sin tra Mado, Qingshui(Ĉingŝuj)-rivero, Jiegu (Ĝjegu), ĉefurbo de la Yushu-a Tibetnacia Subprovinco, sin daŭrigas laŭ Shangyuanziqu kaj Za Qu (Za Ĉju) ĉe la rivero Lancang kaj fine atingas Ĉamdon de Tibeto. Ĉu la trunka vojo, ĉu la branĉa, ili ambaŭ devas transiri Bayanhar-montaron.

Ni suriris la branĉan vojon

kondukantan de Yushu al Ĉamdo.

ALTEBENAĴA FEINO

La montaro Bayanhar kuŝas sude de la mezo de Qinghai-provinco, limtuŝante la monton Kekexili (Kekeŝjili) en la okcidento kaj sin ligante kun la montoj Minshan kaj Qionglai (Ĉjonglaj) en la oriento. Ĝi estas la suda branĉo de la grandioza Kunlun-montaro. Sur ĝi ne estas imponaj pintoj, nek groteskaj rokoj. Rigardate de malproksime, la montaro estas verdverda, kvazaŭ rivero ondanta sur la firmamento. Ĝi ne estas distingiga inter la montoj, kiujn nia antikva vojo transiras, tamen ĝi estas mondfama pro tio, ke ĝi estas akvodislina montaro de la Flava Rivero kaj Yangzi-rivero, kiuj nutras la ĉinan nacion.

La norda montdeklivo de la

montaro estas kompare milda, tamen veturante sur ĝi, oni sentis sufokitecon, vomemecon kaj kapdoloron. Ni komprenis, ke tion kaŭzis alpa malsano. Ĉe la montpasejo ni vidis ŝtonan vojmontrilon 3 m altan, kiu okulfrape staras ĉe la vojrandoj. Sur ĝi legiĝas la vortoj "Montpasejo de Bayanhar, 5 082 m super la marnivelo". Tie la vento blovis furioze, neĝflokaj flirtis en la ĉielo, tamen la neĝo ne amasiĝis sur tero pro forta blovo. Jen kaj jen vidiĝis floroj kaj verdaj herboj. Ja komenciĝis printempo, vigliĝis la montpasejo.

La deklivo maldekstre de la montpasejo estas kovrita de efloreskaj rokoj, kvazaŭ ekspluatitaj de ŝtonhakistoj antaŭ nelonge. Nia vojgvidanto, montrante la monton, demandis: "Ĉu vi volas neĝlotusojn? Ĉi tie ja estas ilia hejmloko."

Kvazaŭ hontemaj knabinoj, neĝlotusoj estas sinkaŝemaj. Ili kreskas en la loko, kie estas multe da malglataj gruzoj kaj malmulte da tero. Iliaj lanugaj floroj estas purpuretaj kun palaj tigo kaj folioj. Neĝlotusoj kvazaŭ kuŝas tuj sur la tero, tamen iliaj radikoj estas fortaj kaj longaj, sin etendante malsupren laŭ la montdeklivo. Iuj el ili longas ĉ. duonmetron, tial ne estas malfacile trovi ilin, tamen estas temporabe trovi kompletan neĝlotuson. Ho, ni ja komprenis, ke la neĝlotusoj povas imponi sur la frosta altebenaĵo ĝuste pro sia diligenta penado. Ili estas veraj altebenaĵaj feinoj. Antikva medi-

Skemo de la antikva vojo Tangbo



cina verko diras, ke ili estas malfacile trovebla efika kuracilo kontraŭ ĉiuspeca malsano kaŭzita de malvarmo. En Ĉinio oni jam trovis pli ol 10 speciojn de neĝlotusoj kaj la Qinghai-aj neĝlotusoj estas unu el la plej vaste uzataj specioj en la medicino.

Ni komencis serĉi la raran drogherbon kaj post duonhora ĉiu el ni trovis bukedon da ili. Ni kolektiĝis kaj alte levis la belajn flo-rojn. Ni fotis nin sur la hejmloko de altebenaĵa feino.

ALTEBENAĴA BRAVULO

En la ekologiaj kondiĉoj de la montaroj Kunlun, Bayanhar, Tangula kaj aliaj lokoj trapasitaj de nia vojo, sur tiuj montaj herbejoj, tundra zono, humida loko, duon-dezerta marĉo kaj arbedaro, viglas tibetaj ĉamoj, bemionoj, nigrakolaj grupoj, blanklipaj cervoj kaj aliaj raraj sovaĝaj bestoj.

Ni vizitis cervobredejon ĉe la montpiedo de Bayanhar. Tie brediĝas cervoj grandaj kiel azenoj. Ili ĉiuj havas blankan lipon, kaj estas unuaklasaj bestoj protektataj de la ŝtato. Iliaj junaj kornoj estas fortikaj kaj dikaj, unu tribranĉa korno pezas pli ol 7 kg. Cervaj karnoj estas superaj tonikaĵoj. El la tanita felo de cervo oni povas fari luksajn vestojn. Iliaj larmoj estas forte malbonodoraj, tamen ili estas mirinde efikaj por kuraci infanan konvulsion kaj apoplek-
Tendaro ĉe la piedo de Bayanhar-montaro

sion.

La blanklipaj cervoj naskas idojn en aŭgusto. Antaŭ sia akuŝo la cervinoj silente forlasas sian kolektivon kaj iras al kvieta loko. La cervidoj povas mem piediri tuj post sia naskiĝo. Bredistoj kaŝobservas tion de malproksime per lorno. Post 3 aŭ 4 tagoj ili persekutas kaj sieĝas la cervinojn kaj iliajn idojn rajdante sur ĉevaloj. La cervidoj pro sia juneco kaj malforteco falas post nelonge. Ili do estas kaptitaj kaj forportitaj al la cervobredejo, dum la cervinoj malĝoje longe kaj senmove staras sur montpinto, gape rigardante ĉion ĉi.

Estas malfacile bredi blanklipan cervon. Oni devas dresi ĝin de ĝia juneco. Eĉ tiele, blanklipaj cervoj estas malfacile dresataj. En la tago, kiam ni tranoktis en la bredejo, por ke katoj kaj hundoj ne ŝtelu nian manĝaĵon, ni metis nian viandon sur balkonon 2 m altan. Sed reveninte de ekstere, ni trovis, ke la manĝaĵo estas faligita surteren. Bredisto diris, ke tio estas ofta kaj tute ordinara. Blanklipaj cervoj ŝatas frekventi homan hejmon. Ili, petolemaj, ofte ŝtele trinkas lakton, manĝas bakitan farunon. Ili ne forlasas la domon, ĝis kiam ili malordigis ĝin komplete. Tio ne estas timinda. Sed timinda estas tio, ke se oni venas ĉi tien en oktobro, kiam la bestoj troviĝas en sek-sardo, oni estas tre facile atakata

de la vircervoj. Tiam laboristinoj neniel kuraĝis labori en la cervaj herdoj, se ili portas buntan veston.

Neatendite, ke la altebenaĵaj bravuloj estas tiel interesaj kaj furiozaj.

KORDICEPOJ


Forlasinte la cervan bredejon, ni postkuris fosantojn de kordicepoj (*Cordyceps sinensis*).


Ni rajdante sur ĉevaloj iris kune kun tibetaj viroj kaj virinoj bele vestitaj. Ni nin direktis al la monta stepo 4 000 m super la mar-nivelo. Tie sur la monto punktiĝas blankaj jurtoj. Ĉe la vespera krepusko fumaj kolonoj leviĝis supren. Ĉiujare en la tempo, kiam oni fosas kordicepojn, sur montoj regas festa atmosfero.

Rigardate supraĵe, kordicepo similas al mortinta insekto, fakte ĝi estas insekto vintre kaj herbo somere, tial ĝi nomiĝas ankaŭ vintra insekto kaj somera herbo.

En aprilo kaj majo ĉiujare kordicepo elteriĝas por elmeti ovon. Kiam la ovo metamorfoziĝas en larvon 3-4 cm longan, flavan kaj kristalan, ĝi enteriĝas kaj fariĝas bazo de kordicepo. Kiam la bazo pleniĝas de miceto, ĝi denove elteriĝas. Kiam falas vintro, la larvo mortas. En la sekvanta printempo ĉio vekigis kaj la miceto parazita en la bazo de kordicepo fariĝas rufa herbo. Jen la vintra insekto kaj somera herbo. Ĝi havas trajtojn kaj de animalo kaj de vegetalato. Vere majstra kreaĵo de la Naturo! Nun la homoj konas entute 23 speciojn de aminoacidoj, kaj kordicepo enhavas 20 el ili, tial ĝi estas valora tonika medikamento.

Fosi kordicepon estas ja multe pli malfacile ol kolekti neĝlotusojn. Kordicepo estas nur 3-4 cm alta surtere, iom pli dika ol alume-to kaj plie ĝi, malhela kiel tero, kreskas inter herboj. Tial vi eble ne vidas ĝin, eĉ kiam ĝi sin kaŝas tuj ĉe viaj piedoj. En la unua duontago ni trovis neniun. Spertaj paŝtistoj konigis al ni, ke oni devas






Paŝtejo sur neĝkovrita monto

serĉi kordicepon matene aŭ vespere, kiam la sunradioj estas malpli fortaj kaj plie nepre kontraŭ la lumoj. Dank' al ilia konsilo ni trovis pli ol 10 kordicepojn en la

sekvintaj du tagoj, tamen tibetnaciaj spertuloj povas trovi pli ol 70 ĉiutage, kies sekigitaĵo pezas ĉ. 50 g. Kolekti kordicepojn estas grava flankokupo por la paŝtistoj sur la

Qinghai-Tibeta Altebenaĵo.

La raraj vegetaloj kaj bestoj sur Bayanhar-montaro prezentis al ni mirindan mondon kaj multe ĝojigis nin en la vojaĝo al Tibeto. ■



Stepo en somero



Paŝtistoj sur altebenaĵo



Vojo sur Bayanhar-montaro



Popolaj ludiloj

La naŭpeca poŝtmarkoserio prenis popolajn ludilojn kiel siajn bildojn. Ĉiu peco havas formaton de 33 X 22 mm. Diversaj ludiloj, prezentataj en la bildoj de la poŝtmarkoj, estas faritaj de ĉinaj metiartistoj el argilo, tolo, papero kaj tritikaj tigoj. La supraj du poŝtmarkoj vidigas tritiktigan virkokon kaj argilan leonon; la mezaj tri poŝtmarkoj prezentas bildojn de argilaj koko kaj kapro kaj tolaj tigroj kaj kamelo; kaj la malsupraj kvar poŝtmarkoj montras argilan kaj paperan nefaligeblan pupon, tolajn tigron, azenon kaj kuniklon, argilajn bovon, birdon kaj virkokon kaj lignan homon.

La poŝtmarkoserio emisiigis la 10-an de dec. 1963, kun speciala n-ro 58.

